6-a Jaro. N-o 272 APERAS SEMAJNE 19. Decembro 1929



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

| REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e<br>Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT<br>23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27<br>Administranto: R. Lerhner |
|---|---|---|

# KIAL PERSISTAS LA KRISTNASKA TRADICIO?

Ni konfesu al ni mem malkaŝe, ke malgraŭ ŝanĝita ekonomia cirkonstancaro de l' nuntempo kompara al antaŭaj jarcentoj, malgraŭ niaj klasbatalaj postuloj kaj metodoj, malgraŭ formiĝo de novaj ĉiam modifiĝantaj klasrilatoj en ĉiuj landoj de la mondo, milion-amasa industria proletaro kun kreskanta tendenco, — ideologie la ŝanĝiĝoj estas malgravaj, malgrandetaj. La plej granda parto de l' laboristaj amasoj treniĝas en la vojsulkoj de malnovaj tradicioj kaj kutimoj signitaj de antaŭirintaj klasoj. Plej karakteriza estas la Kristnaska festo.

Ateistoj, liberpensuloj — por tute ne paroli pri la nekonsciaj proletaj elementoj, kiuj konsistigas la grandan laborulan armeon —, restas koncerne al "Kristnasko" — malraciaj. Precipe, kie estas familio, estas infanoj, ni observas ĉiujare la saman fakton, ke ankaŭ klasbatalantoj sinceraj kaj principojn ŝatantaj obeas la ĝeneralan senton kaj animan staton, festas iel la tradician feston de Amo kaj Paco. Kaj ni aŭskultu iliajn argumentojn, kiuj estas preskaŭ ĉiam la samaj: "Jes, certe, ni ne kredas je la sensencaĵo, ni estas liberpensantaj homoj, la legendo nenion valoras por ni — sed . . . estas simple familia festo, ĝi fortigas la familian solidaron, ĝi feliĉigas niajn infanojn!"

Kontraŭ tia argumentado plej ofte la *racio* vane batalas. Kaj tio estas komprenebla, ne nur ĉar tradicioj. ideoj enradikigitaj de longaj jarcentoj havas ankoraŭ forton postdaŭri, kiam jam ŝanĝiĝis la objektivaj materiaj kondiĉoj, sed ankaŭ kaj ĉefe — ĉar mankas tio, kio anstataŭus la malnovan ideologion, aŭ almenaŭ ne sufiĉe alestas en la spiritoj, por venke likvidi la malnovon.

Estus malsaĝe kritiki en negativa maniero pri "oportunismo" aŭ postuli abrupte ĉesigon de tradicia kutimo sub la minaco "nomi stultaj dikredantoj kaj religiuloj" tiujn, kiuj daŭrigas festi, ne pensante eĉ unu momenton verdire pri religiaj formoj de l' festo, sed nur penetrite de la ideo feliĉigi junajn animojn. Tia ago signifus nur subtaksi la rolon de l' sentaro en la vivo de l' homoj, trotaksi la fortojn de pura homa racio. Kontraŭbatali ni devas, jes, laŭ niaj ebloj, tiajn festojn, kiuj apogas la burĝan ideologion potence, sed ne kondamni la tradiciemulojn — ne donante al ili rimedon por liberiĝi. Kun la negativa kritiko devas esti ligita pozitiva fingromontro. Se la kontraŭbatalo estas abrupta, kruda, ni atingos facile la malon de tio, kion ni celas: niaj K-doj en Sovetio, ŝajnas, sufiĉe spertis tion en sia kontraŭreligia batalo; ili scias, kion signifas voli trudi novan spiriton al religiuloj, eĉ al ekskreduloj. La spontana reago de l' truddevigitaj personoj montris al ili, ke oni devas elekti pli singardajn rimedojn por veni al la celo.

Fakte, en landoj, kie la kapitalisma ideologio ankoraŭ estas centoble pli forta kompare kun la novaj ideoj, kiujn timeme alportas nova laborista generacio, — t. e. ĉie en la mondo escepte en Sovetio (kaj eĉ tie la batalo pro venko de novaj ideoj estas nur en komenca stadio) — estiĝas neeviteble por proletaj gepatroj, eĉ plej klaskonsciaj, la konflikto: kiel kompensi la infanojn, kiuj vidas ĉie siajn kamaradetojn ludantaj, pridonacataj, el la provizoj de l' lukse garnitaj magazenoj, kaj ĝoje feliĉaj. Kiel klarigi al ili la aferon en komprenebla, t. e. la sentojn de l' infanoj tuŝanta maniero? Se la gepatroj persistas, konsekvence rifuzas donaci al siaj idoj en tiu tempo difinita, kiam kvazaŭ psikozo atakas la tutan infanaron, — tiuj infanoj neniam komprenos la motivojn, ili sentos sin ĉagrenitaj kaj malpli valoraj ol aliaj infanoj. Ni devas konsideri, ke nature la kolektivsento ĉe infanoj ĉiulandaj (ankaŭ en la individuema Francio) estas tre forta, per lernejo, komunaj ludoj, promenoj ktp. La kolektiveco estas natura bezono de la infano (kiel ĝi estis la natura stato de l' primitiva homo, kio tamen ne signifu, ke mi konsideras la kolektivecon kiel malsuperan formon: Male! Mi opinias, ke per kolektiva vivado la individuo povas nur gajni, neniam perdi).

Oni vidas, ke infanhavaj gepatroj liberpensaj okaze de Kristnasko troviĝas en malfacila situacio. Eble la bona volo ne mankas ĉe ili eduki en novaj formoj, helpi krei alian spiritostaton. Sed ili vidas sin en medio, kies spiritostato konstante influas per multego da influiloj, kaj se ili mem, dank' al sia racio, povas eviti tiun influon, ilin tamen igas la granda animdoloro de l' etuloj malraciaj pro sia aĝo, fari reirpaŝon kaj konsenti partoprenon je la festo kune kun la tuta samaĝularo.

Kion do faris la proletaj organizoj politikaj kaj kulturaj, kiuj ekkonsciis pri tiu stato? Ili simple maskis la aferon en plej multaj okazoj. Ili lasis la radikon kaj faris nur formalajn ŝanĝojn. Same kiel la liberpensulaj unuiĝoj, kiuj imitas la religiajn ceremoniojn de "firmigo" kaj "sankta komunio" por gejunuloj forlasantaj la lernejon, anstataŭigante la ekleziajn gestojn kaj manipulojn per laikaj. La proletaj organizoj vidis kompreneble, ke necesas fortiri la infanaron de

l' burĝaj kristnaskaj festoj. Sekve ili... imit-konkuras, samdate kaj samhore kaj eĉ ofte restas la nomo "Kristnaskofesto"; eventuale oni aldonas nur la vorton "Ruĝa" por distingo. Kompreneble tio estas tre oportuna. Oni evitas tiel la infanplorojn, feliĉigas... eĉ oni starigas Kristnask-arbojn laŭkutime, ornamante ilin anstataŭ per Krist-krucetoj kaj Betlehemaj steloj — per ruĝaj flagetoj kaj sovetaj steloj, kaj solvas tiel la konflikton: la konscienco estas trankvila: oni festis revolucie...

Ĉu tia solvo estas taŭga kaj inda? Certe ne. Ĉar la fetiĉismo restas. Persistas la malnova tradicio ĝis la detaloj en proletaj rondoj, — kio pruvas, ke la laborista klaso ankoraŭ ne lernis pensi memstare kaj — ne havas anstataŭaĵon (ĉar ne sufiĉas neniigi, necesas plenigi malplenon).

Homoj volas kaj rajtas ĝoji kolektive. Fortaj devas helpi malfortajn — tio estas proleta (homa) etiko, kaj al tio apartenas, ke plenaĝuloj donacu al infanoj... tiu principo validos en ĉia socio. Kiu proponas solvon laŭracian, liberpensulan kaj nuntempe aplikeblan — kiu samtempe ne sentigus al la infanoj mankon de feliĉo, envion kaj ĵaluzon pro samaĝuloj ĉirkaŭ ili riĉe pridonacitaj? Laborista idaro, jam vivanta mizere, jam sendonaca dum plej junaj jaroj, bezonas pli ol aliaj feliĉigon. Individua, arbitra, neorganizita donacado kontraŭas nian priamasan koncepton. Ni, kiuj celas kunigi per niaj ideoj, sub unu standardo amasojn, ni agu ĉiam laŭ amasa skalo, ne laste rilate al komuna edukado... Temus sekve, kiel oni nun dekrete provas en Sovetio, kontraŭstarigi al tiaj potencaj ideologiaj faktoroj, kia estas Kristnasko, ali-date speciale proletajn festojn, ĉe kiuj infanoj trovus kontentigon por siaj bezonetoj kaj popularigi ilin kiel la 1-an de majo (kiun daton mi ne proponas por ne forviŝi la batalkarakteron de tiu tago). —

Estus maljuste, se mi ĉi loke ne mencius la klopodojn de la proleta junularo (en Germanio kaj kelkaj aliaj landoj) anstataŭigi Kristnaskon per "sunturniĝ"-(solstic-)festoj (en somero kaj en vintro), kiuj estas aranĝataj en la mezo de l' libera naturo. kun freŝo rimarkinde kontrastanta al la ĝisnunaj kutimoj. Tiuj aranĝoj montras firman volon rompi kun konvencioj kaj malnovaj tradicioj kaj — oni ne troigas dirante, ke ili fariĝis tre popularaj en la koncernaj medioj. Se ili ankoraŭ ne povas sukcese konkuri kun la Kristnasko-festoj, almenaŭ la elpaŝo, la ekkomenco estas ĝoje aprobinda kaj subteninda de ĉiu liberpensanta homo, ĉu juna, ĉu maljuna.

Kial tie la infanoj ne trovu kompenson por la tradicia familia Kristfesto? Ĉu ne kun dorsosako kaj kordmuziko, akompanataj kaj "patronataj" de l' gejunularo pli aĝa, ili povus trovi la feliĉon kaj la profundajn impresojn, kiujn al ili donis ĝis nun la kristana festo aŭ ĝia kopio? Tio ankaŭ estas la unua paŝo por transformi la nun regantan familian hierarkion. Mankos la Kristnasko ĉirkaŭ la familia tablo, la preteksto, ke necesas simbola familia festo, perdos sian validon, kaj eĉ skeptikuloj ne dubu, ke la infanoj en tiaj "festoj" libernaturaj, prizorgataj de siaj pli aĝaj fratoj-kamaradoj, trovos la saman feliĉon animan, la saman kontentiĝon kiun ili sentis antaŭe ĉe piedo de la Kristnaska arbo kun donactablo.

Ĉu aranĝo de tiuj novaj festoj kaŝas en si danĝeron de nova tradicio? Miaopinie ne, ĉar estas la junaj, kiuj ilin kreas kaj vivigas, kaj inter la junaj estis ĉiutempe la plej grandaj malamikoj de tradicioj. Ĉe tiaj festoj ne estos idoloj, dioj, fetiĉoj, kaj mi pensas, ke ĉe ili la plej junaj devus stari en la centro, ĉar la infanaĝo estas mallonga periodo, dum kiu kelkaj impresplenaj okazoj povas havi bonfaran efikon por la tuta estonta evoluo de l' kreskantoj. Ne imiti la religiulojn, sed fortigante Novon venki ilin, devas esti nia devizo. *Bartelmes.*

---

**? Nova SAT-revuo por edukistoj?**

*Atentu venontajn numerojn!*

---

# Kaduka ve-kanto

Ĉiujare, kiam alproksimiĝas januaro, miaj karaj gekorespondantoj sendas al mi amasojn da bondeziroj okaze de la Nova Jaro. Ili vere ne scias, ke nur unu n-o ŝanĝiĝas, sed ke niaj vivkondiĉoj restas la samaj. Kompreneble mi riproĉas tion al ili, klarigante, ke tio utilas neniom; ke ili similas al kamparanoj, kiuj preĝas por pluvigi aŭ al virinoj, kiuj ekbruligas vakskandelojn por ricevi iun rekompencon de dio. Kelkaj respondis, ke mi pravas. Aliaj, ke tio ne gravas, ke estas simple la *kutimo* kaj ke mi ne bezonus ekkoleri pro tia bagatelo.

Tiun parolon mi ne povas konsenti. Sciu bone, ke pro la *kutimo* oni fumas, drinkas, oni vizitas preĝejojn, bordelojn, oni edziĝas spite la amleĝaro, oni kroĉas super sia lito la bildon de tiu granda naivulo Jesuo aŭ similulo, oni patriotiĝas kaj konsentas morti por la patrio de la industriistoj, oni estas sklavo de la modo, oni vizitas kinojn, en kiuj ni estas stultigataj, oni ripetas, kion ni aŭdis ne serĉinte la veron, oni fanatikiĝas en iuj politikaj partioj, oni konsentas loĝi en domaĉoj. Pro *kutimo* oni eĉ demetas sian ĉapelon antaŭ sia mastro.

*Marceau (7767).*

## Italio, Musolini kaj aŭstriaj "hejm-defendantoj"

La provokado de aŭstriaj "hejmdefendantoj" kaj naci-liberigaj intrigoj de la hungaroj evidentigas ioman interligitecon je ago kaj faro. Apenaŭ iu povas imagi, ke tiuj ĉi malpacoj en centra Eŭropo estas direktataj el unu sama agcentro kaj ke post ili staras la faŝista diktatoro Musolini. En Köln (Germanio) la estinta popoldeputito Miglioli faris malkovron, kiu vekis grandan atenton. Miglioli konstatis, ke Musolini preparas faŝistan mezeŭropan Ŝtaton, kaj ke en Aŭstrio estas farita grava komenco. Musolini planas starigon de granda Katolika Ligŝtato malsupra-danuba, laŭeble kun reĝo ĉekape. La reĝo de tiu Ŝtato devus esti Habsburgano. Al tiu ĉi nova Ŝtato devos aparteni: Aŭstrio, Hungario kaj la katolika parto de Jugoslavio, nome Kroatio kaj Slovenio, kaj de Ĉeĥoslovakio devos esti forŝirata la provinco nomata Slovenio. Krome devas esti alligata Bavario kaj laŭeble Badenio. Tiu ĉi mezeŭropa katolika Ŝtato devos esti tute faŝista. Provoj pri realigo de l' Musoliniaj planoj estas jam farataj. En la unua vico estas la diktatoreco en Hungario kaj reakcikatolika registaro en Bavario. En Kroatio jam estas malkovritaj liaj fadenoj, kiuj kondukas ĝis Vieno.



Bilanco de l' faŝismo

La alarmo de l' "hejm-defendantoj" en Aŭstrio estas nenio alia, ol efektivigo de la Musolinia plano. La forŝirado de Slovenio devas efektiviĝi sub la devizo "aŭtonomio". Tiu ĉi movado estas facile .kaptebla por la sciigita plano. Miglioli montris, kiel oni intencas rekompenci la slovenojn por ilia akcepto de la "Vivu la Faŝismo!"

Tiuj ĉi planoj de la faŝista diktatoreco signifas danĝeron por la paco. Ne nur ili pliigas la politikajn streĉiĝojn en Eŭropo, sed ili elvokas eĉ akutan militdanĝeron. La faŝismo per siaj intencoj tuŝas la tuton de du ŝtatoj. Miglioli asertas, ke tiu ĉi tendenco estas publike subtenata de la itala registaro. *Knourek (2474), Vieno.*

---

**KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"**

# FAMA LINGVOSCIENCULO MORTIS

**Prof. Boduen de Kurtene' (Baudouin de Courtenay)**

3-an de novembro mortis en Varsovio post 84-jara vivo la scienculo Boduen de Kurtene, kiu meritas nian atenton pro sia kuraĝa pledado por esperanto en tempo, kiam preskaŭ ĉiuj lingvoscienculoj primokis la klopodojn de l' esperantistoj. Jam havante gloran nomon en eŭropa lingvoscienco, la granda slavisto eldiris valoran vorton por lingvo artefarita kaj por esperanto speciale. Tio estis granda helpo por la propagandistoj de nia movado.

Post studo en Varsovio kaj okcidentaj universitatoj li fariĝis en 1870 doktoro de filozofio, poste per du gravaj prilingvaj laboroj doktoro de kompara lingvoscienco hindo-eŭropa. Li lekciis kiel docento kaj profesoro en Kazan, Dorpat kaj Peterburgo (nuna Leningrad). Post 1918 li revenis Polion kaj reprezentis ĝis sia morto lingvosciencon ĉe la Varsovia universitato. Okaze de lia jubileo en 1921 eldonis por honori lin 42 lingvistoj-profesoroj memorlibron konsistantan el laboroj de liaj disĉiploj kaj kunlaborantoj. Multajn novaĵojn li enkondukis en lingvo-scienco pri leĝoj regantaj la disvolviĝon de lingvoj hindo-eŭropaj, pri gramatiko praslava ktp. En siaj verkoj kaj paroloj li manifestis sin kiel temperamentan liberpensulon, senĉesan batalanton por la libero de l' popoloj. Sed tiu homo, malgraŭ ĉiuj honoraj titoloj, kiujn li ricevis, estis en sia vivo turmentata, persekutata, kalumniata, priridata, malamata, nekomprenata. Preskaŭ tutan sian vivon li devis batali kontraŭ malriĉo, kvankam li vivis spartane modeste. Antaŭ sia morto li kuraĝis dediĉi sian kadavron al la universitata sekcejo, por ke la scienco havu ian utilon el la restaĵoj.

Al la simpla, preskaŭ mizere vivinta ateisto oni donis multekostan enterigon — ofendo al la spirito de l' mortinto!

# Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)

(5-a daŭrigo. Vidu n-ojn 267/71.)

### Kiel pagi laboron?

Dübreŭj plendas pri salajro po peco ĉe "General Motor Co." (Ĝenerala Motor-Ko.), konkuranto de l' Fordfabrikoj. Pecoj estis alportataj kaj forportataj per vetursistemo. Sed ofte veturantaj pecoj ne alvenis je ĝusta tempo, malbone funkciis. La laboristo perdis tempon, do salajron. Ankaŭ por ŝanĝi ilojn, sur tornmaŝino, kiu rapidege eluzis tiujn ilojn eĉ vaporigante oleon brulantan, laboristoj perdis tempon kaj salajron. Ĉiuj protestis. Taĉmenta ĉefo ne estis pli feliĉa, ĉar li perdis ankaŭ premiojn kaj nenion povis fari por akceli alvenon de veturilaroj kun pecoj.

Malmoderna laboro laŭ peco, kun popecaj prezoj ofte senprecize, hazarde fiksitaj. Mastro malpliigas la prezon, kiam ŝajnas al li, ke la metiisto "tro gajnas". Ĉiuj protestas. Malbona sistemo por akiri pli da produktado.

Telor-sistemo ŝanĝis tion: oni bone mezuris *tempojn, normojn*. Malnovtempe la kamparanoj mezuris kampojn laŭ nombro el paŝoj tien kaj reen: neniu faris la saman paŝon. Rezultis procesoj. Nun oni mezuras kampojn laŭ dekonmetro, lignon laŭ milimetro, ŝtalon laŭ centon-milimetro. Telorsistemo mezuras la laboron same precize, laŭ sekundo. Por ĉiu peclaboro fiksiĝas iu "standard" (normo)-tempo. Laŭ tiu normo, "standard"-salajron oni starigas.

Tiun salajron ne ĉiuj perlaboras. La plej malaltan salajron, kiun dunganto perlaboras, ni supoze nomu *Dungsalajro.* Laŭ sia kreskanta laborpovo metiisto perlaboras ĉiam pli inter dungsalajro kaj normsalajro, kiom plej bone li sukcesas. Kompensojn por tempoperdoj pagas mastroj laŭ precizaj kalkuloj ankaŭ: ekzemple 14.3% en iu fako de Dübreŭj.

Dübreŭj priskribas diversajn salajrosistemojn po peco. Ĝenerale en Usono tiuj kalkuloj estas sufiĉe simplaj. Ĉiu laboristo facile antaŭkalkulas kaj kontrolas sian salajrofolion. Ofte en Francio ne estas tiel, skribas Dübreŭj. Tute ne eblas kontroli salajro-bileton, ĉar diversaj salajr-partoj eĉ ne estas konataj de laboristoj.

### Vivkosto en Usono

Dübreŭj prezentas la vivkoston laŭ bonega sistemo: por ĉiu produkto li kalkulas, *kiom da laborminutoj* kostis al li ĝia akiro en Usono, kaj kiom da laborminutoj li elspezus en Francio por sama aĉeto. Jen:

| | *en Francio* | *en Usono* |
|---|---|---|
| Litro da lakto . . . . | 22 minutoj | 13 minutoj |
| Dekduo da ovoj . . . | 150 „ | 55 „ |
| Duonkilo da terpomoj | 9 „ | 6 „ |
| do. sukero . . . | 35 „ | 7 „ |
| do. kafo . . . . | 180 „ | 60 „ |
| do. kakao . . . | 160 „ | 25 „ |
| do. bona bovoviando . . | 160 „ | 35 „ |
| do. porkoviando . . | 160 „ | 18 „ |
| Unu koko . . . . . . | 120 „ | 30 „ |
| Pano (duonkilo) . . | 15 „ | 6 „ |
| Kino . . . . . . . . . . | 60 „ | 20 „ |
| Milkilogr. da karbo . | 85 horoj | 23 horoj |
| Kvinlitro da nafto . | 120 minutoj | 20 minutoj |
| Kotonŝtrupetoj . . . | 60 „ | 30 „ |
| Kompleta vestaĵo . . | 75 horoj | 50 horoj |
| Ŝuoj . . . . . . . . . . | 20 „ | 8 „ |

Por monata loĝado, franca laboristo elspezas meze 35 horojn monate, sed kutimas tre malbone loĝi. Usona laboristo elspezas 75 horojn, sed loĝas komforte: 5 ĉambroj, preskaŭ ĉiam banĉambro, kaj kolektiva hejtado. Por hejmtelefono pagus franca laboristo 24 horojn monate, sed li ne abonas. Usona laboristo abonas por 3 horoj monate.

Dübreŭj denove rimarkigas, ke tiun pli facilan vivon usonanoj ŝuldas al grandega riĉo de la grundo, kiun ili tre industrie kaj moderne prilaboras, dekfoje malpli nombraj proporcie sur tiu grundo, ol eŭropanoj. — 12 homoj po kvadratkilometro en Usono. 10 ĝis 150 en Eŭropo.

### Pri senlaboreco

En aŭto-fabriko Ŭajt & Ko. (White & Co.), muntisto, kiu laboris apud Dübreŭj muntante dentradojn por "ŝanĝoj de rapido" ĉe aŭtoveturoj, diris al li, ke li antaŭ dekdu jaroj dediĉis unu tagon da laboro por tiu muntado. Li nun dediĉas al la sama laboro nur 31 minutojn. Do, deksesaŭ dudekfoje pli rapide fariĝas tiu muntado, proksimume. Ĉu dekkvin aŭ deknaŭ laboristoj maldungiĝis, kaj restis nur unu? Ne. Industrilaboro pli facila, malpli kara, sekvigis vendadon kaj produktadon plian; dungiĝis laboristoj por tiu pluso. Sed industrio ne tuj, foje eĉ tute ne redungas la 15 aŭ 19 forigitajn metiistojn. Ĉiu malplia dungo signifas senlaborecon, kiu rezultas de fakprogreso.

La *"maŝinon-laboriston"* usonanoj nomas *"robot"*, rusa vorto. Laŭvorte, *"robot"* estas por usonanoj la nomo de *homomaŝino* ĝis nun ne kreita. Sed laŭfakte tiu "fantomo" estas simbolo tre vivanta: ĉiu usona laboristo antaŭvidas la momenton, kiam *"robot"*, la maŝino, anstataŭos lin ĉe fabriko, kaŭzante lian maldungiĝon. Dübreŭj bonege montras tion.

En Novjorka tubvagonaro, per maŝina kontrolado je vojaĝantoj, la nombro da kontrolistoj falis de 1500 ĝis 471 subite.

En la fabrikoj Ŭajt & Ko., por sama semajna produktado de 300 ŝarĝaŭtoj, nombro da laboristoj falis de 1921 ĝis 1928 de 6500 ĝis 4000. Gazeto *"Iron Age"* (Ŝtalepoko) deklaris: "En aŭtokonstruado 30 laboristoj produktas en 1925 pli, ol 100 en 1914." Kaj tiel plu . . .!

En Usono, la laboristoj ne ricevas helpon dum senlaboreco. Oni sekve ne povas kalkuli la nombron da senlaboruloj. En Anglio oni kalkulas ilin laŭ nombro da taghelpoj pro senlaboreco. Oni nur scias pri Usono, ke la vicoj da senlaboruloj petantaj laboron plikaj plilongiĝas antaŭ pordegoj de laborejoj.

(Daŭrigota) *Jief.*

# POPOLA VOĈDONADO EN LATVIO

Dum jaroj 1918/19 okazis bataloj pro Latvia liberigo de malamikoj — parton de germana armeo, t. n. "Landeswehr" (land-defendularo) kaj bolŝevikoj. La plej granda parto de la tero apartenis al germanaj nobeloj. Dum la mondmilito oni formis apartan armeon, kiu konsistis el tiuj nobeloj kaj estis parto de l' aktiva germana armeo kun nomo "Landeswehr". La membroj de tiu trupo celis forpeli la bolŝevikojn kaj same la nove fonditan respublikan armeon por renovigi la "grandan, nedivideblan" Rusion. Sed la nacia armeo kun helpo de l' Antantaj landoj venkis ĉiujn malamikojn, kaj sur la ruinoj de Soveta Latvio kreiĝis nacia, "demokrata" respubliko.

La registaro promesis al ĉiuj partoprenintoj je la bataloj doni teron aŭ monon. La nova respubliko forprenis de ĉiuj nobeloj iliajn posedaĵojn sen kontraŭpago kaj transdonis al kamparanoj po 1,5 hektaroj. En tuta Latvio estas ĉirkaŭe 200 mil-tiaj novaj kamparanoj. "Leonan" parton de la tero ricevis ne proletoj, kiuj fakte partoprenis batalojn, sed burĝoj kaj kapitalistoj. El 30 mil militistoj 10 mil mortfalis aŭ donacis al "kara patrio" siajn piedojn kaj manojn. La lastaj de l' ŝtato ricevas monatan monsubvencion de 13 latoj (ĉ. 3 us. dol.), per kiuj oni povas nek malsatmorti nek vivi. Restintaj 20 mil personoj ĝis nun nenion ricevis kaj ankaŭ ne ricevos. Sed, . . . tamen ili post sia morto ricevos tombon en la kara tero de l' patrio . . .

Nun, post 10 jaroj la registaro al siaj estintaj malamikoj — "Landeswehr"-anoj, donas pli bonajn terpecojn kaj bienojn. Oni motivigis ĉi tiun fakton per tio, ke la "Landeswehr" helpis forpeli bolŝevikojn el teritorio de Latvio. Ĉiu lerneja bubo en Latvio scias el la historio, ke tio estas mensogoj, ĉar la 22. 6. 1919 apud urbo Cesis okazis batalo de latva kaj estona naciaj armeoj kontraŭ "Landeswehr". La vera kaŭzo estas, ke la nuna registaro apogas sin sur voĉoj de germanoj, rusoj, hebreoj k. a. en la parlamento. Se la registaro kontraŭstarus la postulon doni teron al "Landeswehr"-anoj, ĝi devus kapitulaci . . . Eksmilitantoj iniciatis popolan voĉdonadon. La bezonataj subskriboj jam estas kolektitaj. La parlamento (Saeima) nun devos akcepti proponon. Aliokaze estos en decembro popola voĉdonado. Kompreneble, ke la faŝista registaro agas ĉiel kontraŭ la propono.

Tiuj ĉi 20 mil personoj, kiuj ricevis publikan vangofrapon, dum 11 jaroj, de naciuloj kaj patriotoj, fariĝis konsciaj proletoj kaj signifas grandan plifortigon por la laborista movado. La proponon subtenas ĉiuj laboristaj partioj, komence de soc.-demokratoj ĝis plej maldekstraj, ĉar kompartio en Latvio estas subtera.

*Ali (13 507).*



## Pri internaciismo — sennaciismo

*Laŭ speciala peto de K-do* Krjukov, *Konsilanto el la 7-a horzono, ni publikigas jenon el lia respondo al unu el la cirkuleroj de la Plenum-Komitato.*

"Pri kongres-debatoj. Mi opinias, ke en debatoj ne estis sufiĉe defendita la ideo de sennaciismo. Oni kvazaŭ timis eĉ uzi ĉi tiun vorton. Ŝajnas al mi, ke la ideo povus esti defendita ne konfliktigante apartajn tendencojn de l' kongresanoj. Ni devas kiel eble plej kutimigi la mondon al la diferenco inter sennaciismo k internaciismo . . . Plejmulto miskomprenas signifon de niaj kulturtaskoj. Ni devas prepari Revolucion en kulturo, kiu plene respondus al tiu en ekonomio. Kaj la revolucio ne estas simpla likvido de analfabeteco inter mondproletaro, nobligo de moroj k kutimoj laŭ burĝa maniero aŭ ĝenerale daŭrigo k vastigo de burĝa kulturlaboro. Oni devas multon renversi en nuna kulturo por fari ĝin taŭga al bezonoj k celoj de mondproletaro, por ke la kulturo iĝu facile atingebla al la proletaro. Ekz. ni bezonegas antaŭ ol lernigi homlingvojn krei novan komunan lingvon, t. e. esperanton, k disvastigi k kutimigi ĝin. Ĝi estas renverso rilate al lingva fako. Same en multaj aliaj sferoj de kulturlaboro: Antaŭ ol likvidi analfabetecon, oni bezonas sîmpligi malnovajn naciajn ortografiojn, t. e. renversi ilin ktp. ktp.

Revolucioj en kulturo estas same necesaj k neeviteblaj kiel revolucioj en sociordo. Ili bezonas samajn streĉojn, eĉ sangon[1] kiel politikaj k ekonomiaj revolucioj. Nia tasko estas prepari vojon por ili. Naciaj politikaj partioj malatentis kulturtaskojn k tial kulturreformoj (kiuj ĉiam venas samtempe kun politikaj revolucioj) plejofte montriĝas ĉifitaj, duonecaj. Tial Sovetio nun havas nur duonreformon de sia ortografio k duon-pastran kalendaron. Tial ĝis nun ideoj pri esperanto k sennaciismo eĉ al multaj komunistoj ŝajnas kuriozaj k postulas kruelan batalon eĉ en Sovetio. Estas granda eraro opinii, ke la reformoj venos mem, sen preparoj k bataloj. Tiaj reformoj naskiĝas k kreskas en evolua maniero, sed enkondukiĝas k leĝiĝas nur per k dum revolucioj (naciaj aŭ internaciaj laŭ la skalo de l' reformoj). Do antaŭ revolucio oni devas zorge elekti, flegi k studi ĉion similan k poste porti en dece pripensita formo al konfirmo de venonta Revolucio. Politikaj taskoj estas nur duono el taskoj de Revolucio. Alia duono estas kulturtaskoj . . ."

[1] Adeptoj de nova unuigita lingvo de ĉinoj Baj ĥua estis malliberigataj, eĉ senkapigataj de kontraŭrevoluciuloj . . . Konataj estas multaj aliaj faktoj en kulturmovado . . .

## *Pensoj pri Klemanso*

*"La anarkistoj estas pravaj; en vero, la malriĉuloj ne havas patrion." Tiel iam parolis Klemanso k iuj konkludis el tio, ke li estis anarkiema. Naivuloj!*

*Klemanso nur konstatis fakton. Kaj li certe klarigis ĝin al si, aldonante pense jenon: "Sed la riĉuloj havas patrion k ilia intereso estas aranĝi la tutan sociordon tiele, ke la senpatriuloj defendu la patrion de riĉuloj."*

* * *

*Klemanso aliam diris: "Mi scias tion, kio estas la Ŝtato k konas ĝian historion. Ĝi konsistas el sango k koto."*

*Pro tiaj vortoj ankaŭ iuj emis konsideri la faman politikiston kiel simpatiantan al la anarkismo. Tiuj simple forgesis, ke tia konstato fare de la "Tigro" signifas, ke la burĝaro ne devas timi uzi sangon k koton por konservi sian klasan superregadon.*

* * *

*Pri religio oni povus citi multajn similajn dirojn de Klemanso. Sed malgraŭ la fakto, ke ĝis la morto li rifuzis, ke pastro flegu lian animon, li tamen volonte permesis, ke monaĥino flegu lian korpon.*

*Se la pastraro ne ĉiam celus flegadi ne nur la animojn, sed ankaŭ superregadi la korpojn, Klemanso kredeble ne estus kontraŭklerikalulo: nur malfortanimuloj ja bezonas tian flegadon.*

* * *

*Simile "Patro la Venko" ne povis toleri, ke militistoj enmiksiĝu en la politiko — k pro tio kelkfoje li ankaŭ parolis kiel kontraŭmilitaristo.*

*Sed se Klemanso estus mem militisto, li certe volus fariĝi Napoleono.*

* * *

*Mi estas unu el la multnombraj admirantoj de Klemanso: li ja estis plej klarvida, talenta, obstina, tigra defendanto de* sia *klaso.*

*Lia ekzemplo povas instrui al la proletoj, kiel ili agadu por liberiĝi el la burĝa ekspluatado.* *Eŭtrapel.*

**Ni rekomendas al vi nian literaturon!**

Postulu la plej novan katalogon ĉe **Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**

Esperanto-Servo

N-o 12 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 19. Decembro 1929

## EL SOVETIO

### Soveti-Ĉinia konflikto

(Esperanto-Servo.) Dum lasta tempo ĉin-generalaj taĉmentoj ĉiuminute atakis sovetlimon. Pro ĉiama atakdanĝero, ĉelimaj vilaĝanoj forlasis siajn vilaĝojn k foriris al sendanĝeraj lokoj. Sur rivero Amur', kiu fluas ĝuste laŭ manĉuria limo, ĉinoj atakis rusan komercŝiparon per torpedoj k nur singardemo savis la ŝiparon de ruiniĝo. La aferoj devigis ruĝarmeon, la 21-an de novembro, kiam ĉinaj taĉmentoj transiris la limon por detruadi sovetajn vilaĝojn ktp., kontraŭagi la atakojn. Ruĝaj taĉmentoj frapis ĉinojn tiel rapide k forte, ke ĉinoj ne havis la tempon por kontraŭstari k eĉ forkuri Ĉinion. 8000 da ili estis senarmigitaj, 10 000 pafilojn k ceteron trofee prenis ruĝa armeo. En la atako partoprenis 24 sovetaj aeroplanoj. La batalo montris belan organizon de ruĝa armeo. *K. Polušin, Irkutsk.*

### Sekvoj de senceda politiko de Sovetio

(Esperanto-Servo.) Ĉinaj generaloj kapitulaciis. Ili komencis pac-traktadon kun sovetia registaro. Post konfliktkomenco internaj fortoj en Ĉinio eksplodis, ĉar pro diplomatia malpaco ĉinia eksporto ĉesis, la Nord-Ĉinia Fervojo, mastrumata de blankuloj, ruiniĝis. Ĉinaj generaloj ne ĉesis internan militon. Ĉiuj elspezoj kuŝis sur laborularo, kiu pro la kaŭzo prenis armilon k iris "kontraŭ propraj generaloj". Ĉinajn provokojn Sovetio neatentis k esperoj de l' generaloj por provoki Sovetion je milito, ne realiĝis, sed firmaj rebatoj de ruĝarmeo plimalvarmigis kuraĝon de l' generaloj. Ĉio ĉi devigis ĉinian registaron, ektrakti pri paco. La 22-an de novembro ĉinoj konsentis je ĉiuj postuloj de Sovetio. Ili konsentis, tuj liberigi sovetianojn en Ĉinio, havi sovetian voj-estron k restarigi la antaŭkonfliktan ordon je la fervojo. Ĉion ĉi ili plenumos antaŭ okazonta diskutkonferenco. *K. Polušin, Irkutsk.*

### Pri la kvinjara laborplano

(Esperanto-Servo.) Laŭ kvinjara plano de l' ŝtata mastrumado k industrio je fino de jaro 1929/30 estos enlokitaj 397,5 miloj da laboristoj de grupo "A" k 163 miloj da laboristoj de grupo "B" je la sephora labortago. Ĉe akva k fervoja transporto ankaŭ enlokiĝos 127,1 miloj da laboristoj je sephora labortago. Entute en industrio oni enlokos 954,2 miloj k en transporto 157 miloj da laboristoj. Laŭ statistikaj informoj en 9 entreprenoj, kie laboras 24,4 miloj da laboristoj, la produktado altiĝis ĝis 12,2%. La salajro altiĝis ankaŭ ĝis 5,3%. En kemia industrio la produktado altiĝis ĝis 20,7%, la salajro plimultiĝis ĝis 7,4%. Nur en leda industrio la produktado malmultiĝis ĝis 3%. En restaj entreprenoj la laboro sephora bone prosperas. *Fedorowski, Kasatin.*

### La konkurado inter cement-fabrikoj

(Esperanto-Servo.) En lastaj tagoj de novembro en urbo Novorossijsk okazis konferenco de kvar cementaj fabrikoj de Nord-Kaŭkazo. La konferenco resumis la konkuradon inter la fabrikoj. Unuan premion — Ruĝa Standardo k 25 000 r. — ricevis la plej granda cementfabriko en USSR. — "Proletarij" en urbo Novorossijsk. Dum la jaro la fabriko donis pli ol 3 000 000 bareloj da cemento k plialtigis la industrian planon je 7%. Duan premion — 15 000 r. — ricevis cementa fabriko en Rostov/Don. La konferenco decidis pri alvoko al la laboristoj de Nord-Kaŭkazo, en kiu je nomo de 6000 laboristoj-cementistoj oni devigas sin, doni al la lando 6 000 000 bareloj da cemento k malaltigi la memkostojn de la cemento je 15,8%. *Filippova, Tver.*

### Konstrua laboro en urbeto

(Esperanto-Servo.) En urbo Sartana ekzistas unu malnova k unu nova fabrikoj k plian fabrikon oni konstruas. Ĉar la malnova fabriko estas malbona, por ĝia rekonstruo la registaro donas 198 000 000 rublojn (99 000 000 dolaroj). Per tiuj rekonstruoj la industrio en tiu urbeto tre vigliĝos. *Bondarevski, Sartana.*

### For stultigilojn!

(Esperanto-Servo.) Kamparanoj de vilaĝo Golcovka decidis: formeti de la preĝejo sonorilegojn k fordoni ilin al la ŝtato; per la mono, ricevita por la sonorilegoj, elektrigi la vilaĝon. Golcovka-anoj alvokis la loĝantaron de vilaĝoj Lunino k Trubetĉino, fari la samon. *B. Esperkoro, Samara.*

### Ne indas nomiĝi patroj

(Esperanto-Servo.) Instruisto V. P. Ostroninov deklaris hodiaŭ: "Mia patro, restante pastro, malutilas al kultura revolucio. Tial mi malkaŝe deklaras, ke mi rifuzas konsideri lin mia patro ĝis kiam li ne forprenos de si pastran rangon." Samon faris loĝanto de vilaĝo Stavropol, Vitalij Vladimiroviĉ Nikolskij rilate al siaj gepatroj (patro estas akolito). Tiuj ekzemploj estas nur iuj el la multaj. *B. Esperkoro, Samara.*

### Kelkaj el multaj

(Esperanto-Servo.) Pastro V. Paradoksov (vilaĝo Tomilovo) deklaras: "...mi cedas de miaj malnovaj konvinkoj, ĉar mi estas konsciiĝinta, ke mi faris al la socio malutilon per mia stultigilo (religio); tial mi forprenas de mi malhonoran makulon k volas esti honesta laborulo k utila kunlaboranto en konstruado de Socialismo." — Alia pastro, Arkadio Paŭloviĉ Vvedenskij deklaris per gazeto "Mezvolglanda Komuno" jenon: "Ne havante ortodoksajn religiajn konvinkojn, mi dum 31 jaroj estis pastro... Mi konfesas pastran oficon malutila por Socialismo; mi opinias, ke kapitalismo, religio k filozofio de ĉiuj specoj, krom materialismo, forvivis siajn jarcenton. Tial mi aligas ideologion de Tutsovetia Komunista Partio (de bolŝevikoj) k forprenas de mi pastran rangon..." Tria pastro, Anatolio Kandalinskij deklaris: "Pastrinte 9 jarojn, nun mi tutkore abdikas ĉion "sanktan" k forprenas de mi rangon pastran. Mi alvokas ĉiujn, sekvi al mia ekzemplo." Iu Gavĉilov deklaris, ke kristanoj elektis lin laŭvice sia prezidanto; sed li opinias sin fidela civitano de Soveta Respubliko k rezignas prezidantecon, ankaŭ religion. — Jen faktoj, kiuj fariĝis al mi konataj dum nur unu tago. *B. Esperkoro, Samara.*

---

## RESPONDA PARTO

*3018.* — Viaj raportoj certe aperos, almenaŭ parte, en la sekvanta n-o, krom la pribalota, kiu malaktualiĝis, k krome en ĉiuj landoj la gazetoj multe skribis pri la temo.

*13 341, 5281, 102, Polušin, Bondarevski, Fedorowsky.* Ĝis nun ne presitaj raportoj aperos baldaŭ.

Preparu raporton pri la sukcesoj, t. e. utiligo de niaj raportoj dum la kuranta kvaronjaro. En januaro ni espere ricevos multajn tiajn raportfoliojn, ĉar nur tiel ni povas kontroli nian aparaton...

---

### 12-a listo de raportoj en jaro 1929/30

72. Soveti-Ĉinia konflikto. K. Polušin, Irkutsk (Sovetio).
73. Sekvoj de senceda politiko de Sovetio. K. Polušin, Irkutsk (Sovetio).
74. Pri la kvinjara laborplano. Fedorowski, Kasatin (Sovetio).
75. La konkurado inter cement-fabrikoj. Filioppova, Tver (Sovetio).
76. Konstrua laboro en urbeto. Bondarevski, Sartana (Sovetio).
77. For stultigilojn! B. Esperkoro, Samara (Sovetio).
78. Ne indas nomiĝi patroj. B. Esperkoro, Samara (Sovetio).
79. Kelkaj el la multaj. B. Esperkoro, Samara (Sovetio).

# SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Rudolph-Herrmann-Str. 7, ptr. r. (Germ.)

## La germana Naturamika Asocio en 1928

Antáŭ mallonga tempo okazis en *Dresden* la ĉi-jara kunsido de la tutlanda komitato de "naturamikoj". El la raporto oni povas ekkoni, ke la movado lastjare bonege sukcesis. La membraro ege pligrandiĝis. La lokaj grupoj atingis la nombron 1000. La ekskursojn partoprenis pli ol 1 000 000 homoj. La libertempaj hejmoj kaj ŝirmkabanoj ampleksiĝis je 241. Ĉirkaŭ 500 000 da personoj uzis ilin por refreŝiĝi kaj plifortigi sian sanstaton. Kiel fakgrupoj ekzistas 400 ekskurs-gvidant-grupoj, 300 vintra-sportgrupoj, 200 fotogrupoj, 100 laborgrupoj por natur- kaj popolscienco kaj multaj muzik- kaj kantgrupoj. La grandan kulturlaboron plenumitan de la "naturamikoj" pruvas la 8000 lumbildprezentadoj kaj paroladoj, kiujn partoprenis pli ol 300 000 aŭskultantoj. Por pliperfektigi la ekskurs-gvidantojn kaj komitatanojn okazis ĉirkaŭ 200 kursoj. La libertempaj vojaĝoj aranĝitaj de la landa komitato tre sukcesis. La aĉet-kooperativo evoluiĝis tre bone kaj ĉiu membro aĉetu siajn bezonaĵojn nur per ĝi. Ĉe la ĉi-jara (1929) ekspozicio "Migrado kaj Vojaĝo" la asocio partoprenis grandskale.

*El la gazeto "La Naturamiko" trad. Wenk Wilh. (7944.)*

---

## Sukcesoj de la Laborista Biciklanta kaj Motorveturanta Asocio Tutgermania "Solidareco" (fondita en 1896)

Tiu ĉi asocio unuigis en si la 31. decembro 1928 laŭ statistiko 248 000, la 31. majo 1929 — 265 000 membrojn. Dum la asocia varbsemajno en junio aliĝis 50 000 novaj membroj, tiel ke la asocio nombris la 1. julio 1929 sume 315 000 membrojn. La monata sportĵurnalo de la asocio atingis eldonkvanton da 320 000 ekzempleroj, monate, je la 1. sept. 1929. Nia ĵurnalo per tio posedas nun la plej altan eldonkvanton el ĉiuj sportĵurnaloj en tutmondo. Ankaŭ por esperanto oni propagandas en la asocia ĵurnalo per regula aperigo de anoncoj por instigi al lernado de l' internacia lingvo inter la sportularo. En la oktobra numero alvokas K-do Liguda, Kesselsdorf-Dresden, la esperantistojn, kolekti la adresojn kaj interrilati per esperanto. Nia asocia membraro praktikas diversajn sportspecojn, ekz.: Artveturado sur pargeto en salonoj kaj sur placoj, pilkludo per bicikloj sur pargeto kaj placoj, veturado sur konkurejoj per bicikloj, sed ne je pli longaj distancoj ol 50 km. Lertec-veturado per motorbicikloj; sed rapidveturado estas malpermesata. La plej ŝatata speco estas ekskursoj per bicikloj kaj motorbicikloj. Krome la asocio ankaŭ posedas propran fabrikon en Offenbaĥ (Majno), por produkti biciklojn, motorbiciklojn kaj partojn por ili. Menciindaj estas plie la asekurentreprenoj kaj ŝparkaso por la membroj kaj multaj vendejoj en aliaj urboj, por ebligi, ke la membroj aĉetu siajn bezonaĵojn kaj veturilojn rekte en la filioj de la asocia vendejo.

La 25., 26. kaj 27. julio 1930 okazos nia impona asocia sportfestego en Drezdeno-Saksio.

*G. N., SAT-ano 8130.*

---

## Pri la nudkultura organizo "Liberaj Homoj" (Freie Menschen) en Germanio kaj Aŭstrio

Kaŭze de mia artikolo en n-o 246 "Kial nudkulturo" mi ricevis informpetojn de kelkaj diverslandaj K-doj, ĉu ekzistas nudkultura organizo en Germanio. Do mi konkludas, ke ankaŭ por la aliaj SAT-anoj estos interese, aŭdi ion pri la nudkulturaj organizoj kaj iliaj celoj.

Krom kelkaj burĝaj unuiĝoj (parte ili volas esti neŭtralaj, sed ni bone konas tian neŭtralecon) en Germanio ekzistas la proletara nudkultura organizo

"Liberaj Homoj" (Freie Menschen), kiu estas aliĝinta al la "Asocio por Popolsano" (Verband für Volksgesundheit, E. V.). Ĝis nun ĝi havas grupojn en 22 germanaj urboj kaj en Vieno. Ĝia celo estas la korpa liberigo de la proletaro, kiu same gravas kiel la politika kaj spirita liberigo. Per malsanigaj laborkondiĉoj, malindaj loĝejoj, falsa edukado, la korpo ofte estas mistraktata kaj la tuta homo en sia memestimo kaj sia vivovolo malfortigata.

Per sunaj, lumaj, aeraj kaj akvaj banoj, migradoj kaj gimnastiko ĝi celas fortigi siajn membrojn. Ĝi postulas de siaj anoj abstinencon de ĉiuj ebriigaj venenoj, laŭnaturan nutradon kaj ĉiutagan lavadon de la tuta korpo. En la membraj kunvenoj estas pritraktataj ĉiuj prikorpaj demandoj kaj la temoj interesaj por la moderna proletaro. Krome la "liberaj homoj" klopodas havigi al si la necesajn ejojn por realigi siajn celojn: herbejon kaj gimnastikejon, altmontar-sunon (kvarclampo) kaj librejon. Estas eldonataj sciigiloj por la membroj kaj klerigaj flugfolioj por la publiko.

En Lajpcigo ni laboras tiele: En la jaro 1928 ni aĉetis herbejon en proksimo de la urbo, kie trafluas rivereto; do ni dimanĉe bone povas bani nin tie kaj fari ludojn laŭ deziro; ni Lajpciganoj ekz. tre ŝatas diversajn pilkludojn. Sed ankaŭ migradoj estas aranĝataj, ni serĉas laŭeble kaŝajn lokojn por nia ripozpaŭzo, por ke ni dum tiu tempo povu senĝene senvestigi kaj sunbani nin. Somere ni lundon vespere luis urban river-banejon, ĉar nia herbejo estas iom tro malproksima por viziti ĝin vespere post la laboro. Krom tio ĉiuĵaŭde en la gimnastikejo de lernejo okazas gimnastiko. Por propra gimnastikejo ĝis nun bedaŭrinde mankas la mono. Nia grupo nuntempe nombras proksimume 150 membrojn.

La akceptkondiĉoj i. a. estas: eksiĝo el la eklezio, aparteno al laborista partio kaj sindikato. Pliajn informojn interesitoj petu ĉe

*SAT-anino 2055 (Leipzig).*

P. S. Al la kritiko de K-do Nik. Zinin, Taŝkent (6184) pri mia artikolo "Kial nudkulturo" mi devas diri, ke li tute malĝuste komprenis la de li kritikatajn vortojn, ĉar ili ne nur esprimas ordon-, sed ankaŭ dezirformon. Mi bone scias, ke estus sensencaĵo, se oni postulus, ke ĉiuj SAT-anoj nudbanu sin, mi nur volas doni al ili la instigon, por ke ili pripensu ĉi tiun aferon, kaj mi ĉiam restas opinianta, ke vera SAT-ano ne povas timi, ke li *tro* progresu ... Eĉ ni nudkulturistoj ne jam ĉiurilate sukcesis rompi kun la tradicio. El mia supra artikolo K-do Zinin dume ekkonos, ke jam ekzistas nudkultura organizo, en kiu cetere estas jam multaj esperantistoj kaj novlernantoj de nia lingvo. Sekve ne necesas, ke ni postulu nudbanadon inter la SAT-anaro.

* * *

Al la artikolo de K-do Barmin, Sebastapolo, "Forgesitaj folioj de la figarbo", mi rimarkigas, ke al progresemaj homoj mankas tiom doloriga sento por estintaj aferoj: ni estas kritikemaj, kaj ekz. ni virinoj fortondigis nian hararon, kvankam en antaŭaj tempoj oni tre ŝatis longajn virinharojn. Multajn samajn ekzemplojn mi povus prezenti. Por okupado pri la biblio al ni nudkulturistoj mankas la tempo, nin pli interesas la nuntempo, kaj ni scias, ke nia movado progresas pluen.

Kvankam mi ja tute ne postulas, ke nun, de hodiaŭ ĝis morgaŭ, ĉiuj SAT-anoj nudbanu sin, mi pritraktis la temon, por ke ili serioze pripensu. Se ĉiuj post profunda pripensado konsentus kun mi, mi kompreneble ĝojus.

Cetere kleraj, klaskonsciaj viroj estis la pioniroj de la laborista nud-

# DISKUTEJO

## Elementoj de la moralo

La apero de artikolo titolita "La higienaj ordonoj konsistigas per si mem tutan moralon", de d-ro Herikur en nia organo, donis al mi tre konvenan okazon profunde pripensi la problemon pri moralo. Efektive tiu ĉi problemo havas nuntempe tre gravan signifon por la proletaro. Ĉar en la tempo, kiam la klasbatalo fariĝas pli k pli intensa k akuta, ĉiuj metodoj kruelaj k ruzaj estas uzataj de l' reganta klaso por subpremegi k kvietigi la regatan klason. Precipe danĝeraj por la proletaro estas diversaj trompoj uzataj de la burĝaro, en la formoj ideologiaj — de juro, politiko, religio, arto, filozofio k moralo. Ni ja devas defendi nin kontraŭ tiaj ideologiaj atakoj, per senindulga senmaskigo de la trompaĵoj, k samtempe armi nin per la propraj ideoj proletaj. Tio estas unu el niaj plej gravaj taskoj, k ankaŭ unu el ĉefaj devoj de nia *kleriga* organizo, SAT.

En la komenco de sia artikolo, d-ro Herikur diras, ke "oni ne povas kontraŭdiri, ke la moralo, en ĉi tiu momento, trapasas krizon". Sed, se tiel, kio estas la moralo trapasanta krizon? Ĉu ni ne povas vidi per niaj propraj okuloj la faktojn, ke en nia prol. klaso tutmonda, novan moralon oni estas konstruanta, detruante la ĝisnunan burĝan moralon? En Sovetio nia frataro estas klopodanta konstrui la veran prol. kulturon — sekve ankaŭ la novan moralon, sur la ruinon de la malnovaj burĝaj tradicioj. Samtempe ni, proletoj en blankaj landoj, firme konstruante nian propran moralon, bataladas kontraŭ la reganta klaso. Kie estas krizo de *la* moralo? Moralo nun trapasanta krizon estas ja nur la burĝaĉa moralo.

Per ĉi tiuj faktoj, ni nedisputeble povas konstati, ke en nuna socio ekzistas almenaŭ du kategorioj de l' moralo — la burĝa moralo k la proleta. El tio devenas demando: kia kondiĉo ekzistigas plurajn moralojn paralele en unu sama socio? Rilate al ĉi tiu demando, ne estas bezone diri, ke ties kondiĉo estas nenio alia ol la fakto de la klas-antagonismo en la socio.

Ĝis nun la moralo estis konsiderata de plimulto da pensuloj k filozofoj (en tiuj adeptoj ankaŭ troviĝas d-ro Herikur), kiel normo devigita de io ekster socio, laŭ kiu la membroj de l' socio devas agi k konduti. Kaj serĉinte la esencon de l' moralo, iuj diris, ke ĝi estas "dia volo" (ĉiuj idealistaj filozofoj), k aliaj opiniis, ke ĝi estas "la racio de naturo", k "la scienco" la radikala franca burĝaro en 18-a jarcento, k d-ro Heríkur).

Sed, "ĉia eraro naskiĝas el tio, ke oni ekstraktinte iun aĵon, *diigas* ĝin". Ĉiuj doktrinoj, de supre aluditaj filozofoj pri la moralo estas eraraj pro tio, ke ili diigis ĝin dank' al dio mem, aŭ *scienco*. Pri "dio" ni jam nenion diri bezonas. Sed, ni devas averti nin pro la pedanta vorto "scienco".

Unue ni pripensu, kiel estas uzataj de l' reganta klaso la diversaj fakoj de la scienco. Ĉu ni ne povas konstati, ke la scienco estas fuŝata de l' burĝaro k ja estas uzata por fortigi ĝian ekspluatadon?

"Postuli senpartian sciencon en la socio de dungsklaveco — diras K-do Lenin — estas sama stulteta naivo, kia atendi senpartiecon ĉe fabrikistoj en la demando pri tio, ĉu necesas plialtigi la salajron de l' laboristoj, malpliiginte la profiton de l' kapitalo". (Tri fontoj k tri konsistpartoj de Marksismo).

D-ro Herikur diras, ke nia moralo estas bazata sur scienco. Tamen, kio estas la scienco signifata de li? Li senhonte diras: "Estas vero apenaŭ kontraŭdirebla, . . . ke la sano estas la plej granda el la bonoj. Nek la potenco, nek la riĉoj, povus havigi saman senton de bonstato." Ho, la plej feliĉa en la mondo estas sanulo! Krom tio, "la fiziologio instruas al ni, ke la korpo estas maŝino, kiu povas esti tenata en bona stato, kiel okazas pri ĉiuj maŝinoj, nur per la *laboro*." Do, sanaj laboristoj, vi estas la plej feliĉaj en la mondo! Vi havas nenion por plendi pri via sorto! Vi devas kontentiĝi per via sano, k la laboro pliboniĝos viajn korpojn. Do, feliĉaj laboristoj, estu laboremaj, nenion postulante, estu ekspluatataj por via sano — la plej granda el bonoj. Vivu sano! Vivu ekspluatado!

Jen ĉi tio estas la scienco k moralo de d-ro Herikur. Ĉu ni povas konsistigi nian moralon per tia stulta "scienco"? Ne, milfoje ne! La moralo estas unu esprimo de la klasaj interesoj, sed neniam estas produkto de la ĉielo.

"Ĉar la socio, — klare diras F. Engels — estis ĝis nun evoluanta interne de la klasaj antagonismoj, do ankaŭ la moralo ĉiam estis klasa moralo: ĝi pravigis la regadon k la interesojn de la regantaj klasoj, aŭ kiam la subpremata klaso fariĝas sufiĉe forta, ĝi esprimas indignon kontraŭ tiu ĉi regado k estontajn interesojn de tiu ĉi subpremata klaso."

Nia proleta moralo tial devas esti konsistigata per niaj klasaj interesoj. Kaj, nun niaj klasaj interesoj estas unuigataj je unu sola celo — venki la regantan klason. Konsekvence, nia propra moralo devas esti bazata sur nia klasbatalo. Klas-batalo konsistigas nian tutan moralon. K-doj ĉiulandaj, ni leviĝu brak' ĉe-brako, por batali kontraŭ la reganta klaso! Nia plej granda moralo estas ja tio!

*Maf, Japanio, SAT-ano 14 509.*

*Eble aliaj K-doj ankaŭ ŝatos diri sian opinion pri tiu tre diskutinda temo. Almenaŭ, mi hodiaŭ tuj rimarkigu, ke K-do Maf tute misrespondas al la artikolo de d-ro Herikur. La demando ja estas jena: ĉu por celkonforme* klasbatali *ne estas konsilinde obei higienajn principojn? Ĉu ne ekzistas nepre obeindaj moralaj principoj, se oni volas garantii bonfarton, prosperon en iu ajn kolektivo? Ĉu estas "morale" aŭ "malmorale" kalumnii, mensogi, diboĉi, neplenumi siajn promesojn k. s.?*

*La kapitalisma sociordo ja krimas en tio, ke ĝi ne ebligas al ĉiu laboristo sanan k komfortan vivon. Sed estas ankaŭ konstatebla fakto, ke laboristoj, vivantaj en tute samaj kondiĉoj, tamen ne same kondutas. Ne sufiĉas citi Marks, Engels k. a. aŭtoritatulojn por forigi tiun fakton. Principoj sendube ne ekzistas en si; vertikalo ankaŭ ne ekzistas en si; tamen ĉiu masonisto devas "obei" vertikalon, kiam li konstruas muron. Oni instruas al masonisto-lernanto uzi vertikalkontrolilon; same oni povas instrui al ĉiu ajn komprenkapabla homo, higienajn principojn k moralajn principojn difineblajn k universale akcepteblajn.*

*Se tio ne ĝustas, ni do sekve ĉesu babiladi pri klerigo k kulturo.*

*E. L.*

---

kulturo, kaj ili ankaŭ konvinkis siajn edzinojn partopreni la nudkulturon (ĝenerale ja virinoj estas malpli progresemaj ol viroj). Tiuj viroj ne havis tian privatposedan opinion pri la edzino kiel K-do B., ili ankaŭ pli fidas al siaj edzinoj.

K-do B. opinias, ke ni nun nur okupu nin pri disvastigo de esperanto kaj pligrandigo de SAT, sed ne pri nudkulturo. Tian opinion mi depost jaroj en la komunista junularo devas aŭdi rilate al esperanto: unue ni faru la revolucion kaj nur poste ni lernu esperanton. Ĉu ili ne same rajtas al tia pensmaniero, se ni esperantistoj ankaŭ nur okupas nin pri esperanto kaj ignoras ĉiujn aliajn demandojn?

*Sennaciulino 2055 (Leipzig).*

---

**"Nia gazeto estu ĉiam klasbatala"**

En "S-ulo" n-o 266 K-do 10 380 el Sovetio demandas "Kio estas vegetarismo?" k li mem konkludas, ke tio estas burĝaj aferoj por detiri la atenton de la laboristoj de l' klasbatalo. Sekve laŭ li oni devas kriegi: For ĉiujn vegetaraĉojn! — por ke ili ne ĝenu la preparadon kontraŭ la nova milito. Tre bone, K-do! Vi *eble* pravas, sed por ke vi sendube pravu, permesu, ke mi konstatu jenon: Aŭ vi havas la cerbon en la stomako k pro tio ne

povas pensi revolucie, se al ĝi mankas kadavra nutraĵo, aŭ vi ŝatas sadismon. Se via cerbo estas en la stomako, do bone: tiam vi plene pravegas. Sed mi dubas, ĉu la strukturo de via korpo estas tiom fenomena; tial mi avertas vin, ke saniga k natura nutraĵo neniam ĝenu la revoluciajn ideojn. Male, ĝi eĉ influas la spiriton al racia liberiĝo. Sed se vi ŝatas sadismon, tiuokaze kial vi kontraŭbatalas la militon? Kiam homoj sin interbuĉas, doloroj sentiĝas, sango elfluas, kriegoj aŭdiĝas k *ne*pardoneblaj amasbuĉoj plenigas la paĝojn de multaj historiaj verkoj. Ĉu vi kredas, ke la kompatindaj bestoj ne suferas k pardonas la buĉiston? Se vi kapablus interpreti iliajn malesperajn kriegojn, certe vi ne plu atakus vegetarismon. Mi pensis kiel vi antaŭ kelkaj jaroj; mi mokis vegetarismon k ankaŭ vegetaranojn k pro tio ne estis pli klasbatalema ol hodiaŭ; mi eĉ ne sciis, kio estas sindikato, partio, esp-o, SAT ktp.

Mi pensis: herbomanĝo taŭgas por bovinoj. Sed hazarde mi vizitis vegetaran restoracion en Parizo k konstatis tie, ke per ĉiuspecaj legomoj oni povas prepari la plej delikatan k bongustan manĝon, ne bezonante buĉi bestojn por nutri aliajn. Specialistoj-kuiristoj funkcias tie en senriproĉaj higienaj kondiĉoj. Kaj la tiea klientaro konsistas ne el burĝaj pacifistoj, kiel supozas K-do 10 380, sed el klasbatalemaj laboristoj, kiuj tie diskutas serioze pri ĉiuj temoj taŭgaj por nia celo. Tie mi eksciis pri esperanto k lernis ĝin. Tie mi aŭdis pri SAT k ĝin aliĝis. Tie mi eksciis pri komunismo k adeptiĝis al ĝi. Tie eĉ la mastroj parolas esp-e, liveras ĉambron por esp. kursoj k ĉiuspecaj lekcioj. Unuvorte, inter tiuj vegetaranoj oni trovas K-dojn tiom revoluciajn kiom necesas por kontraŭbatali novan militon. Ni ne bezonas nepre manĝi kadavrojn por esti kuraĝaj kontraŭ imperialismo. Ni ne estas dogme pacifistaj; ni scias, ke por akiri pacon, ni devas akre batali. Tial ni kontraŭbatalas imperialismon kun la kom. partio, sed ne permesas, ke iu ajn insultu vegetarismon por esti konsiderata kiel klasbatalema. K-do 10 380 opinias, ke, por ke nia gazeto estu ĉiam klasbatala, oni ankaŭ devas batali kontraŭ la bestoj. Forpelu el via kapo tiajn pensojn, K-do! La bestoj rajtas vivi kiel la homoj, sed se ambaŭ specoj ĝenas aŭ atakas nin, tiam ni senkompate ekstermu ilin. Mi persone estas preta defendi la Sovetiajn konkirojn, sed tial, en elektebla momento, mi ne ŝanĝos mian naturan karoton je via artefarita kolbaso. Tiel sin esprimas ĉiuj revoluciaj vegetaranoj en Parizo.

*Soares (6727).*

*Red. noto.* Pro abunde ricevita materialo pri tiu temo ni enmetos en venonta n-o resumon k fermos la debaton.

**Pri la "Paĝoj"**

Mi ne intencas diskuti pri la riproĉo de K-do 10 380 en "S-ulo" (266) pri vegetarana sekcio, kvankam mi kiel vegetarano volus klarigi, ke ni celas levi la moralan k sanan staton de la laboristaro por ĝin fari pli labor- k batalkapabla. Eble viandmanĝantoj, drinkuloj ktp. estas pli batalkapablaj . . . eble . . . Sed pri la "Paĝoj":

Inter la SAT-anaro estas diverse pensantaj K-doj. Eĉ inter la samprofesiularo estas malsamopiniantoj; ekz. inter la medicinistoj estas malpacoj inter alopatistoj k homeopatistoj ktp. Ĉiuj ni finfine rajtas unuiĝi k utiligi por ni la SAT-aparaton. Por senutile ne malhelpi unuj al la aliaj mi proponas jenon: Ĉiuj SAT-Sekcioj (krom tiuj havantaj ĝeneralan komunan intereson por ĉiuj anoj, ekz. junulara, scienca, virina ktp.) rajtas havi siajn specialajn Paĝojn. Sed ili devas esti pagataj de la Sekcianoj k dissendataj kune kun "S-ulo" al la pagintaj K-doj. Pago speciala por la "Paĝoj" estas samtempe pagata kun la abonpago al "S-ulo".

*J. Brukson (1836), Leningrad.*

## Kiel oni traktas fremdajn maristojn en Nederlanda Gujano

Perdinte mian ŝipon ĉi tie k serĉante alian, mi estis arestata, k la policano prenis min al la policejo. Tie ili forprenis miajn vestojn k monon, demandante: "Ĉu vi volas labori, aŭ ni tenos vin en la ĉelo?" "Ĉu mi devas resti longe ĉi tie?" mi demandis. "Tiom longe, ĝis la sama kompania ŝipo revenos, kiu bezonos maristojn, aŭ ĝis la agento forsendos vin kiel pasaĝeron al Eŭropo." Mi postulis renkonti la britan konsulon, k mi diris, se mi devas resti ĉi tie (en malliberejo), mi preferus labori. "Bone, — je la oka vi komencos labori." Dirinte tion ili remetis min en la ĉelon, kie jam estis antaŭe 8 homoj, plejparte negroj.

La tropika suno varmigis la ĉambron k kreis odoron de necesejo k de ŝvitantaj homoj, kiuj ne havis ŝancon lavi sin jam delonge. Ĉio ĉi efikis kiel venena gaso k kaŭzis naŭzon. Malfacile mi povis kompreni, kio rajtigis ilin, teni nin kiel krimulojn en malliberejo. Jam estis la 7-a h. matene k mi esperis, ke je la 8-a mi povos klarigi mian situacion. Sed vane mi atendis; ili ne elprenis min, k jam pasis 27 horoj, kiam fine mi povis renkonti la britan konsulon, kiu klarigis la kaŭzon de mia aresto. Li diris, ke la loka leĝo permesas al neniu resti ĉi tie, kiu ne deponis 250 guldenojn (100 dol.) k tial ili tenas min en malliberejo, ĝis ŝipo troviĝos, sur kiu oni bezonos maristojn.

Klariginte al la konsulo, ke mi ne havas eĉ la plej malgrandan deziron resti ĉi tie, mi petis lian konsenton, ke mi povu aĉeti la vojaĝkarton al Kolumbio-Santa Marta, de kie mi esperis ricevi la ŝipon al Roterdamo. Do oni donis policanon, kiu akompanis min . . . ne al la Kolumbia konsulejo por ricevi la necesan "vizon", sed al la policejo, kie iu oficiro diris al mi, ke li pensas, ke mi ne havas la necesan sumon por la vojaĝo.

"Kiom kostas la vojaĝo?" mi demandis. "La vojaĝo kostas 36 guld. plus vizkostoj". — "Bone, mi havas pli ol 70 guld. ĉe mi."

Do ili diskutis, k fine la oficiro diris, ke estus pli bone resti en la malliberejo, ĉar facile povus okazi, ke mi devus atendi la ŝipon en Santa Marta dum longa tempo, k la sumo posedata de mi ne sufiĉus. Mi klarigis, ke mi havas familion, k se mi devus ĉi tie atendi monatojn, ĉi tiu estus en serioza katastrofo. Ke pro tio mi devas skribi al la plej proksima estonia konsulo, por sciigi lin pri mia afero. La oficiro aŭdinte tion, koleriĝis, k kruele puŝante min en la ĉelon, diris: "Ha, vi volas minaci min per tio."

Jam pasis multaj tagoj, kiam la adjutanto donis laboron al mi en la soldata kantino k permesis al mi dormi en malplena ejo proksime de la kantino. Mi prefere akceptis tion, ĉar en la ĉelo la sanitaraj kondiĉoj estis tiel malbonaj, ke mia sano estis minacata de infektoj. Nun mi laboras 12 horojn tage. Sed almenaŭ mi havis ŝancon skribi al la konsulo pri mia situacio, k sendi la leterojn per privataj homoj al la poŝto. Poste mi renkontis oficiron de la "Immigration Office" (Oficejo por enmigrantoj), kiu diris al mi, ke, se la agento volus, li povus min tuj forsendi al Eŭropo, kiel pasaĝeron. Li diris ankoraŭ: "Se vi restos tro longe ĉi tie, ni skribos al la agento, k li devos forsendi vin k devos pagi 1 dolaron por ĉiu tago dum via ĉi tiea restado." "Do, vi tenas min en malliberejo, postulas labori 12 horojn po tago, k krom tio mi devas pagi 1 dolaron al vi, por ĉiu tago?"

"Jes, se vi ne volas labori, ni fermos vin en la ĉelon, kiel vi preferas?!!"

Dum unusemajna laborado mia bona vesto tute ĉifoniĝis, k nur poste oni donis alian veston por laboro. Mi ne kredas, ke ĉio ĉi estas laŭleĝe permesata: teni la homon sen juĝo dum monatoj en malliberejo k postuli labori senpage 12 horojn tage.

Estus treege agrabla, se iuj K-doj, kiuj scias pli bone la leĝon, bonvolus konsili min pri la afero. Kien mi povus sendi miajn protestojn k informiĝi, ĉu ili havis rajton agi tiele? Personoj volantaj konsili min skribu al adreso: V. Kolk. C/o Estonian Consulate, Pieter de Hogweg, Rotterdam, Holando.

*SAT-ano 14 167.*

# TRA ESPERANTIO

## *INTER NI*

*Oni ne malofte babiladis pri la demando, ĉu Zamenhof "kreis" aŭ nur "iniciatis" esperanton. Li mem deklaris: "Mi ne volas esti* kreinto *de l' lingvo, mi volas nur esti* iniciatoro.

*Ni komprenu ĝuste la signifon de la vortoj: "Mi ne volas . . . mi volas nur." Cetere, Zamenhof diris aliokaze, ke* "kreado *(substreko nia) de plena en ĉiuj rilatoj taŭga k vivpova lingvo postulas specialan talenton k inspiron."*

*Ĉu ne estas eble eliri el tiuj ŝajnaj kontraŭdiroj? Certe jes! Sufiĉas por tio kompreni, ke ĉiam la vortoj havas sian plenan k precizan signifon nur en kontakto kun la kunteksto k plie, ke oni devas scii, en kiu tempo, en kiuj cirkonstancoj ili estis eldiritaj. Kompreneble tian esploron mi ne povas fari en la kadro de ĉi tiu artikoleto.*

*Mi tamen asertas, ke Zamenhof fakte "kreis" . . . la* fundamenton *de nia lingvo; li donis al ĝi spiriton, animon — pli ĝuste, vivpovecon. Sed prave oni ankaŭ povas argumenti, ke li estis nur ĝia iniciatinto. Estas ja evidente, ke esperanto evoluas, pliriĉiĝas, plifirmiĝas kun sia ĉiutaga, ĉiufaka aplikado.*

*Homo, vivanta en antaŭfiksitaj kondiĉoj, rezultanta el multe da heredaj, historiaj k ekonomiaj faktoroj, homo el karno k sango — Zamenhof! — enkorpigis la ecojn necesajn por lingvon "krei", "artefari", "naski" — kiel al vi plaĉos! — Jes, homo,* individuo, *ne kolektivo, ne komitato.*

*Sed la "kreita", "artefarita" aŭ "naskita" lingvo estis ĉe la komenco kvazaŭ malforta infano, ŝanceliĝema sur siaj kruroj; ĝi bezonis nutron, zorgon, edukadon k spacon por akiri la necesan forton k konkeri la mondon. Tion povis al ĝi donadi nur* kolektivo. *Sekve oni ankaŭ povas aserti, ke la nunan esperanton kreis — kreas! — kolektiva kunlaborado.*

*Se Zamenhof vivus en malgranda insulo, perdita en Oceano k havanta neniujn rilatojn kun la ekstera mondo, li certe ne "kreus" esperanton. Sed tio ne signifas, ke nia lingvo povus ekzisti sen "kreinto", nur per la mirakla forto de la kvazaŭ diigitaj "produktaj fortoj"*[1]. *Kiuj asertas, ke nia artefarita lingvo (ne temas pri natura idiomo) rezultas de "socia produktado" aŭ de io simila, tiuj iel parencas mense kun s-o Merĉnt (Merchant), la prezidanto de la* Int. Centra K-to de la Esp. Movado, *kiu lastatempe skribis, "ke Esperanto estas unu el la plej grandaj benoj iam donacitaj de la Bona Dio al la homaro, pere de la genio de homo."*

*Ĉiama problemo: Ĉu la medio faras la homon k ĉu li restas absoluta sklavo de la medio? Tro unuflanka elmeto de l' demando. La homo estas parto de la medio — k ĝia plej aktiva parto. Li transformas la medion, adaptas ĝin al si k sekve okazas, ke la transformiĝo atingas tioman gradon, ke la vivkondiĉoj, la produktaj fortoj fariĝas tute malsamaj; tial ili reefikas sur la transforminton mem. Senĉesa luktado k ekvilibro de kontraŭaj inter si fortoj!*

*Homo artefaris esperanton; homoj, miloj da homoj aplikas ĝin k per tio arte aliigas la medion, faciligante la interrilatojn, kreante novan spiritostaton, eĉ novan ideologion . . .*

*Tamen restas multnombraj revoluciuloj, internaciistoj tiom sklave adaptiĝintaj al la medio, tiom rutinemaj sur tiu kampo, ke ili tute ne atentas la mondlingvan movadon. Se hazarde, okaze, ili paroletas pri "kunfandiĝo de nacioj", tiam ili prezentas al si ankaŭ kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj en unu solan —* naturan.

*Bonan ŝancon! . . .*

*Dume ni senlace aplikadu nian herezan, artefaritan esperanton.* E. L.

[1] Oni ne miru pri mia insisto tiurilate. La demando ja estas tre grava: temas forte konvinki niajn K-dojn, ke iliaj volo, persisto k sindonemo kondiĉas grandparte la sukceson de nia movado. Ni ne devas blinde malatenti la fakton, ke la grandega plimulto da esperantistoj tute ne komprenas la veran socian, historian signifon de artefarita lingvo k pro tio tre diletante rilatas al nia afero.

## EL LA ADMINISTREJO

Preskaŭ en ĉiu n-o de "S-ulo" ni atentigas niajn membrojn per "ŝtopilo" pri la cito de la membro-numero ĉe interrilato kun la Administrejo, sed multaj Gek-doj ne rigardas, ni ne scias, ĉu pro forgeso, ĉu pro oportuno, la membrokarton (cetere ĉiu bona SAT-ano parkere scias sian numeron). Tiu necito en leteroj kaj poŝtkartoj multfoje kaŭzas al ni malagrablojn kaj tempoperdon. Ofte okazas, ke iu K-do transloĝiĝis al alia loko, eĉ lando.

**Por ke "S-ulo" restu 12-paĝa!**

La SAT-anoj en Nîmes kolektis . . . . . . 40.– f.fr.
K-do Habert (55), Sucy 20.– „

**Kaj vi?** Se ne mone vi povas oferi, — ĉu vi strečis viajn fortojn por havigi al ni novajn abonantojn per aktiva varbado?

Se ĉi tiu K-do nun pagas sian kotizon kaj ne citas la numeron, tiam ni ne povas scii, ke tiu Z., nun loĝanta en Moskvo, estas identa kun tiu en Minsk. Sekve en la Administrejo ni donas al ĉi tiu K-do novan membrokarton kun nova numero. Post kelkaj semajnoj li skribas, citante sian membro-numeron: "Mi estas malnova membro, vi donis al mi novan numeron, jen mi resendas la novan membrokarton . . ." La sekvo estas, ke ni devas forĵeti la karton kaj la laboro estis vana.

Ofte ankaŭ okazas miskomprenoj ĉe niaj sovetiaj, hispanaj kaj portugalaj K-doj. Ja ili ofte havas tri aŭ kvar nomojn kaj kiu estas la familia, ni eĉ ne povas diveni; pro tio estas necese, ke oni substreku la familian nomon kaj nepre *membroj citu la membronumeron.* Jen ekz.: ". . . Sed verŝajne mi erare skribis en enketo nur unu mian familinomon *Smirnova*, kaj vi sendis al mi ankoraŭ novan membro-karton n-on 13 284. — Suslennikova, Suslennikova-Smirnova kaj Smirnova Antonina Sergeevna estas unu persono." — Do antaŭe nia K-dino estis registrita sub la nomo Suslennikova n-o 8390 kaj poste, ĉar ŝi ne citis la membronumeron kaj skribis nur Smirnova, ni kompreneble akceptis ŝin kiel novan membron. Ni aldonu, ke ĉi tiu cito de unu ekzemplo estas unu el multaj.

* * *

Aperis la novaj membrolibroj por aktivaj membroj. Al tiuj, kiuj jam sendis la kotizon por la jaro 1930, ni jam ekspedis la novajn membrolibrojn, parte en "S-ulo", parte aliel. Ni ĝentile petas niajn membrojn jam nun renovigi la membrecon por la jaro 1930, por ke ni povu iom dividi la laboron ĉe la registrado de novaj membrolibroj.

La jarlibro 1929/30 estas en presado kaj la presisto klopodos liveri ĝin al ni fine de decembro. K-doj, kiuj ne jam pagis sian kotizon por 1929, tuj faru tion; estas ankoraŭ tempo, por ke viaj adresoj aperu en la jarlibro, almenaŭ en la suplementa parto. — Kiel ĉiujare la ekspedado de la jarlibro kostas al ni ĉiam multe da mono; pro tio ni ŝatus, se niaj K-doj kaj perantoj interkonsentus, ke ni povu sendi la jarlibrojn kolektive al unu adreso, laŭeble. Kiu konsentas al ĉi tiu aranĝo, bonvolu jam nun okaze informi nin pri tio. Nepra postulo estas: preciza disdonado. *Adm.*

### Pri esperanta Morse-alfabeto

K-do N. Ĥolm (5459), en "S-ulo" 265, proponas esp. morse-alfabeton. Des pli laŭdinda intenco, ju pli nun oni rajtas sendi telegramojn redaktitajn esp-e, kaj ja ne ekzistas specialaj morsaj signaloj por iuj nur esp-aj literoj. Tamen, laŭ mia opinio, ĉiuj signaloj proponitaj de K-do N. Ĥ. ne taŭgus, ĉar jam ili estas uzataj por iuj neesp-aj literoj. Ekzemple:

| Por literoj | signaloj prop. de K-do N. Ĥ. | nun uzataj por literoj | anstataŭe mi proponas |
|---|---|---|---|
| ĉ | — — — . | ò, ö, õ | — . — . . |
| ĝ | — — . — | q | — — . — . |
| h | — . — — | y | . . . . |
| ĥ | . . . . | h | . . — . — |
| ĵ | . . . — | v | . — — — . |
| ŝ | — — — — | ch | . — — . . |
| ŭ | . . — — | u, ü | . . — — |

Kiel oni vidas, laŭ propono de K-do N. Ĥ., telegrafisto devus uzi saman signalon por du malsamaj literoj. Nedubeble, tio okazigus multajn gravajn erarojn, ĉar ankoraŭ dum longa tempo, krom esp-o, ja oni uzos por telegrafi tiujn lingvojn enhavantaj neesp-ajn literojn. Ties morsaj signalojn ni do ne devas elekti por la nur esp-aj literoj. Tiuj, kiujn mi proponas, estus certe pli taŭgaj, ĉar laŭ mia scio ili ne ekzistas en la nuna internacia morsa alfabeto.

*SAT-ano 13 706 (radiotelegrafisto).*

---

### ĈU NI SCIU, AL KIU NI SKRIBAS?

Respondo al K-do Cowan

La konkludoj, kiujn K-do Cowan faris el mia propono al korespondpetantoj: mencii pri sia profesio por faciligi la korespondadon ("S-ulo" n-o 264), estis por mi granda surprizo. Mi estus la lasta, kiu postulas limigon de korespondado nur inter samfakuloj. Tre kontenta mi estus, se konstruisto k dancistino trovus komunajn interesojn. Sed por ke tio okazu, estas ja ankaŭ necese, ke ambaŭ sciu, kiuj ili estas. K-do Cowan certe ne neos la fakton, ke korespondantoj, ĉefe en la komenco, plejparte preferas korespondi antaŭ ĉio kun samfakuloj por ekscii la diferencon de la vivkondiĉoj en diversaj landoj.

Se venas homo k petas interligi lin kun fervojisto ekz. aŭ liberpensulo aŭ junkomunisto, kiel ekscii el la blinda anonco, kiu estas la korespondpetanto? Ĉu ĉeesto de informoj pri profesio k aĝo malhelpus al pli larĝa, nesamfaka korespondado? Ŝajnas, ke ĝi fariĝos pro tio nur pli konscia k malpli hazarda, blinda. Do, K-do Cowan, ne kontraŭ "homeca solidareco" mi estas k ne krei "ŝtuparon" inter la SAT-anoj mi intencas, sed nur raciigi la laboron de korespondperanto.

*I. Lisiĉnik (3632).*



## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

*L. L. Zamenhof, Originala Verkaro.* Kolektitaj k ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Eld. Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, Esp-o-fako, 1929 pĝ. 604, formato 15×22½ cm., bindita. Prezo mk. g. 15.—.

Granda verko kuŝas antaŭ ni k por fari ĝian detalan priparolon, necesus eble ankoraŭ pli da paĝoj ol ĝi mem entenas... Ni preterlasu ankaŭ iun ajn kritikon pri la ĝenerala aranĝo, ĉar tio kondukus nin tro malprok simen. Ni simple akceptu ĝin tia, kia ĝi estas.

D-ro Dietterle, la kompilinto, ne ŝatas la epiteton "majstro", kiun donis la esp-istoj al Z. vivinta. Ni ne havas la saman opinion k pensas, ke ĝuste post la morto, oni povas "sendanĝere" por iu ajn ĝin lasi al tiu tiom multe suferinta homo. Ni eĉ supozas, ke Z. certe pli facile pardonus al ni tiun epiteton, ol al eminentaj en nia rondo ame prediki k fie praktiki....

La libro konsistas el ses partoj: *Antaŭparoloj, Gazetartikoloj, Traktaĵoj, Paroladoj, Leteroj k Poemoj.*

Kiam ni nun relegas Zamenhofajn *Artikolojn,* ni konstatas, k. Z. ne estis lute trankvila homo, kiel oni volus al ni kredigi. Kontraŭe li montriĝas homo pasia, kritikema k kiu defendas sian vidpunkton k siajn opiniojn ne malofte kun sarkasma ironio. Ni admiras lian ĵurnalistan talenton. Ni kuraĝas eĉ diri, ke se Z. montriĝus inter ni ne kiel nia "majstro", sed kiel simpla esp-isto, niaj eminentuloj ne tro ŝatus lin en niaj vicoj pro lia sincero, demokrateco k emo al kritiko...

El la *Traktaĵoj* montriĝas, ke Z. bone konis multajn projektojn de lingvo internacia antaŭ la kreo de esp-o. La plej malforta traktaĵo ŝajnas al ni pri *Esp-o k Volapük* (el j. 1889/1890). El la aliaj ni vidas, kiom Z. volis labori por la homaranismo, k ke tio estis lia ĉefa deziro. Pro tio li intencis forlasi "oficiale" la esp-o movadon por povi "libere" dediĉi la reston de sia vivo al liaj homaranismaj idealoj. La milito ne permesis al li realigi k krei novan mondon... Tamen por ĉiam restos al ni liaj sagacaj k profundaj: *Gentoj k L. I.* k *Post la granda milito.* D-ro Dietterle enmetas tie ĉi ankaŭ du partojn el "Vivo de Zamenhof" de Privat, ne konvinkiĝinte tamen pri ilia enmeto-rajto. Ŝajnas al ni, ke laŭ la alnoto de la kompilinto, ni devas trakti tiujn partojn, kiel poezian imagon de la aŭtoro.

*Paroladoj* estas senescepte granda fonto de pripensoj. Ili estas perloj, pri kiuj ni povas esti fieraj. K ni ne miras ke kvankam Z. estis malbona oratoro (ĉu ni ne povas tion konfesi?), ilia legado elvokadis ian ekstazon ĉe la esp-istoj k donis la necesan entuziasmon al la plua laboro. Ĉar cetere ĉu ne pli valoras la *enhavo,* ol la *brileca* parolo?

Unu el la plej interesaj partoj por tiuj, kiuj jam enprofundiĝadis stude en la aliaj originaloj de Z., estas sendube *leteroj,* kies kolekto ne estas tiom instrua, kiom ĝi povus esti. Ni persone tre bedaŭras, ke la reĝa krajono de cenzurinto forstrekis al ni partojn, kiuj estus tre valoraj por povi finfine doni *veran* historion de multaj okazintaĵoj. Ĉu ni ĉie k ĉiam devas maskobali? La cenzuro unufoje estis eĉ kontraŭ la opinio de Z. mem! La letero n-ro 344 estas cenzurita k jen en la postsekvanta (n-ro 345) Z. diras: "Mi plene rajtigas vin montri mian leteron de la pasinta semajno al ĉiuj k ĉie, kie vi volas"... Sur la pĝ. 585 la kompilinto presigas "receptan folieton", sur kiu Z. konfirmas la ricevon de certa sumo al Saĥarov, por pruvi, ke Z. uzis esp-on en siaj propraj negocaj aferoj. Laŭ ĝi tiu supozo estas erara. Ĝi nur montras, ke ricevinte monon (por esp-aĵoj) Z., por konfirmi ĝian ricevon, uzis paperon, kiun li havis submane.

La libro havas bedaŭrinde preserarojn, sed ni ne postulu tro ĉe la unua eldono. Ni tre bone komprenas, kiom atentostreĉan laboron postulis la kontrolado de tekstoj k kiom grandan penon postulas tia kompilo. La ekstera vesto de la libro estas tre zorga. Tiel cetere ĉiam aperas la libroj ĉe Hirt. La prezo estas iom alta por tiuj, kiuj kutimas al pli malkaraj eldonoj. Sed kiom neelĉerpebla fonto de esp-a historio k de ĝia fondinto, el kies nur

N. LENIN
ŜTATO KAJ REVOLUCIO
En la traduko de G Demidjuk
150 pĝ., formato 12×18 cm
Pr. 1.— mk.g.
SAT-eldono
Lenin klarigas en tiu verko la rilatojn de l' socialista revolucio k de l' proleta klaso al la ŝtato. Ĉiu — ĉu sampensanto, ĉu malsam-opinianto — devas konatiĝi kun la enhavo de tiu por la revolucia praktiko tiom signifa verko de l' granda gvidinto de la Rusa Revolucio.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

kelkaj frazoj oni povus disvolvi abundajn verkojn!

Kiom multe oni povas skribi pri Z. k liaj ŝirdoloroj! Ili kristaliĝas en tiu frazeto, kiun li skribis certe kun granda timo, por ne perdi por ĉiam influan rusan amikon al nia afero: "mi devas (sic!) sciigi vin, ke mi estas nek kristano, nek luterano, — mi estas hebreo". Eble ni ne devas bedaŭri, ke Z. naskiĝis en tiu medio de moralaj suferoj, kiaj ja estas pli teruraj ol la materiaj, sed nur, ke li ne povis formigri el tiu infero en alian landon, iom pli liberan, kie li estus trovinta pli da kompreno, pli da morala subteno por lia "sennacia" lingvo k lia idealo de homaranismo, de kiu ni estas tiom, tiom malproksime ... *S. Grenkamp.*

*Evangelio de Spirita Korpo de Okamoto-Rikiĉi.* Evangelioj de Belismo. Vol. I. 32 pĝ. Form. 12×19. Senpaga por tiuj, kiuj estas malriĉaj, ke ili ne povas pagi la preskoston. Eld. adreso: Bikĵo - Kjodonoen, Sano - jubinkjokukunai Kacurajama. Ŝizuoka-ken. Japanio.

Legante la titolon oni povus pensi, ke temas pri propagandilo de religia stultiga sekto. Tamen, foliumante la broŝuron (verkitan en senriproĉa esp-o), ni konstatas, ke temas pri profundpensa ellaboraĵo sur scienca bazo. La aŭtoro plene forĵetas la kristanan kread-kredon kun ĝia kreinto, ĉian superstiĉan kredon. Tamen plaĉas al li nomi sian science prezentitan tezaron "religio" (Belismo). Post elementaj klarigoj pri scio, scienco, sciencaj hipotezoj, kun cito de abundaj trafaj ekzemploj, li venas al la kerno: la mallumo, kiu ĉirkaŭas la spiritan fenomenon, la hipotezo pri "spirita korpo". La libreto estas leginda. N. B.

## AL NIAJ BRITIAJ GEK-DOJ!

Per ĉi tiuj linioj ni informas niajn klientojn, ke K-do Sherriff (London) *ne plu estas la peranto por SAT.* — Monsendojn, se eble, oni rekte sendu al Leipzig per poŝtmandato. Por individuaj membroj peras nia K-do *C. W. Spiller,* Dewsbury Road 13, *London, NW 10.*

Rekomendinde estas, ke niaj Gek-doj instaligus kurantan konton ĉe SAT, ĉar per tio ili povas sendi pli grandan sumon kaj poste povos mendi laŭplaĉe, ĝis la kredito elĉerpiĝis. *Adm.*

## MEMORNOTO

**Priesper. artik. k notojn enhavis:**

*Signalen,* Stokh., 28. 11., *La Revista Blanca,* Barcelono, 1. 12., *Lyon Républicain,* 28. 11. (pri lab. esp. festo, eldonkv. 80/90 000), *D. Deutsche Eisenb.,* Berl., 10. 11., *Der Freidenker,* Berl., dec. (kurs-anonco), *Neue Zeitg.,* München, 8., 15., 23. 10., 11. 11., *Münchener Post,* 3., 7., 10., 12./13., 16. 10., *Aurora,* Porto, dec., *Leninec,* Ivanovo-Vozn., 20. 11., *Soc. Konkurado,* Majkop, 22. 11.

**Peresper. materialon enpresis:**

*Majak Kommuni,* Sebastopol, 27. 9., 11., 18. 10., 7., 18. 11., *Soc. Konkurado,* Majkop, 7., 22. 11., *Leninec,* Iv. Voznesensk, 21. 11. (kliŝo sur unua pĝ.), *Neue Zeitg.,* München (*Nordbay. Volkszeitg.,* Nürnbg.), 24. 10., 28. 10., 7. 11., *Daily Worker,* Novjorko, 2. 9.

## NIA POŜTO

*14 737.* — Via artikolo estas certe tre interesa, sed ĝia enmeto riskus okazigi disputon, kiun ni devas eviti en la intereso de la unueco en SAT.

*1810.* — Via manuskr. el Italio ne troviĝas en niaj kajerujoj. Ni ankaŭ ne memoras pri ĝi. Sed povas esti, ke ĝi estas sendita al la red. de "LNE" (Moskvo), se temas pri literaturaĵo.

*13 555.* — Via verketo aperos en "L. L.".

*13 885.* — Vian versaĵon ni uzos; la disk. art. aperos resume.

*Labkor. Forst.* — Nuntempe, kiam "S-ulo" havas deficiton pro nesufiĉe granda nombro da abonantoj, estas devo de ĉiu rondo iom helpi pagante tiajn tekstojn.

*1453.* — Prokrasto okazis tial ke la art. de 14 167 ne estis senpere sendata al la Red. Vi devas cetere pagi por la lasta alineo laŭ la anonca tarifo al la Adm.

*13 397.* — Via art. aperos en venonta n-o.

*10 566.* — Nur kontraŭ pago laŭ anonca tarifo.

**Novaliĝantoj al SAT devas pagi aliĝkotizon. Vidu n-o 267 de "S-ulo".**

## Nekrologo

Pro la proleta malsano (ftizo) mortis 21. 10. nia kara, nova, sed fervorega

K-do *Kotja Snedov* (12 387)

eks-batalanto dum civilmilito
kaj lasttempe aganto sur kultura fronto
kaj en socialisma konstruado de
nia proleta ŝtato.

*Nikolaev-a SAT-anaro.*

# K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

**Unu enpreso:** Simpla trilinia anonco kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
**Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.**

**BRITIO**

K-do W. R. Bayliss, 115 Dickens St., *Peterborough,* petas siajn koresp-antojn dume ne skribi, ĉar li migras al Usono. Nova adr. baldaŭ sekvos.

**ĈEKOSLOVAKIO**

K-do Josef Schöne, *Niedereinsiedel* Nr. 183, dez. koresp. kĉl. k kun K-doj el germanlingva regiono (Volgo) de Sovetio.

**GERMANIO**

K-do William Bierbaum, Grenzgraben 59/1, *Chemnitz,* dez. koresp kĉl., L, PK, PI, bfl.

K-do F. Hentschel, Vorsetzen 64, *Hamburg 3,* dez. interŝ. PM. Sendu unue!

K-do Herb. Heber, Sidonienstr. 170. *Tharandt b. Dresden,* dez. interŝ. PM kĉl. Resp. tuj k certe.

K-do Johann Wilfert, Fischergasse 11, *Hof i. Bay.,* dez. koresp. kĉl., L, PI, pri ĉ. temoj, prec. pri liberpensismo. Resp. garantiata.

— 20 kursanoj *ne plu* dez. respondojn el eksterlando, ĉar ni jam tro multe ricevis. I. Wellborn, H. Kuhl, H. K. Dost.

K-do R. Pförtner, Petzoldstr. 11, *Sebnitz i. Sa.,* dez. koresp. kun sinceraj revoluciuloj ĉl. k anarkiemuloj el Sovetio, nur veraj antikapitalistoj skribu!

K-do A. Rössler, 25 j. (sportulo k fotoamatoro), Kupferstr. 8, *Esslingen am Neckar,* interŝ. PI k fotojn kĉl.

**SOVETIO**

K-do Velikanov, Aleksio (26 j., kom.), *Tiĥoreckaja,* S.-K. ĵ. d., Cerkovnaja 71, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-dino M. Grabenko, Esperanto-Sekcio ĉe Rajsovet, *Dĵankoj,* Krimeo, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

*Adresŝanĝo.* — K-do J. Gromov (6477) loĝas nun en: *Tomsk,* Tverskaja 41 (antaŭe en Blagoveŝĉensk).

K-do A. S. Kogan, Plitnickaja ul. 3, *Staraja Russa,* Novg. okr., dez. koresp. kun radioamatoroj ĉl., L, gaz., ĵurnalojn.

K-do Vladimir Belajev (junulo), *Bologoje,* Okt. ĵ. d., R. I. K., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do Peĉjo Ĵukov, *Tiĥoreckaja,* S.-K. ĵ. d., Parovoznyje masterskije, Mestkom. 1, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do K. Paĉikovskij (Ukrainio), *Priluki,* dez. interŝ. PM, bfl., kĉl. Resp garantiata.

K-do E. Pimenov (19 j.), Kurajevskaja 25—7, *Penza,* dez. koresp. kĉl. (pref. ekstereŭropaj), pri esp. movado, vivkondiĉoj, kino k. a. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-dino V. Maslova, Vokzal, 4 vraĉebr. uĉastsk, *Krilovskaja,* dez. koresp. kĉl.

K-do G. Zekin (elektristo), Fabriko im. Frunze, Nova Kolonio 49, kv. 4, *Konstantinovka,* Artemovsk. okr., dez. koresp. pri ĉ. temoj, PI, il. gaz., ĵurn.

— Rondeto de esp-istoj dez. koresp. pri lab-istaro, socialista konkurado k. a. temoj. Adr.: Niĵegorodsk. okr., *Semenov,* Lernejo de instruktoroj al Esp. Rondeto.

*Adresŝanĝo.* — K-do Sinclair Söderberg (7430), Lubenskaja ul. 8, kv. 2, *Leningrad* (antaŭe en Norrahammar, Svedio).

K-do Boris Zelenski, "A" 57—2. *St. Sartana,* Mariupol. okr., dez. koresp., L, PI, PK, PM, fotoj, il. gaz.

K-do Johano Kulikov, Saoki, 3 rajon 114, *Sartana,* Mariupol. okr., dez. koresp., L, PI, il. gaz.

**Sendiuloj — SAT-anoj!**

Ĉe Taŝkenta distrikta Konsiliĝo de Militantaj Sendiuloj organiziĝis Esperanto-Servo. Ĝi celas kunligi per esp-o Taŝk. sendiularon kun div-landaj sendiulaj k liberpens. organizoj k apartaj kontraŭreligiuloj por interŝ. de spertoj k novaĵoj en kontraŭreligia batalkampo. K-doj, helpu pruvi taŭgecon de esp-o por tiu celo. Skribu multnombre mem k devigu skribi viajn kontraŭreligiajn organizojn, perante al ili. Resp. garantiata ĉiam tre interesa, ĉar Taŝk. sendiularo batalas ne nur ĉe kristanoj, sed precipe laboras inter mahometanoj-uzbekoj.

Adr.: USSR. *Taŝkent,* Okruĵnoj komitet KP(b)UZ, Okrsovet bezboĵnikov, Kuĥarskomu.




Laboristoj el kelkaj Odesaj fabrikoj dez. koresp. kun prolet-organizoj, fabrikoj, redakcioj k individuoj ĉl. Adr.: *Odessa* (USSR), Lassalstr. 12, ORPS, Kultviddil, Esp.-Konsultejo, al Danovski.

**Laboristoj el Hamburg, Glasgow k Amsterdam!**

Kunligiĝu kun Odesaj entreprenoj! Adr.: *Odessa* (USSR), Lassalstr. 12, ORPS, Esp.-konsultejo, al Danovski.

**Gravaj taskoj**

estiĝas

**por la Proletara Esperanto-Grupo Hamburg-Altona**

pro aliĝo al loka JFA

Estas dezirataj: Ĥoroj kaj spektakloj revoluci-tendencaj, leteroj pri aktualaj temoj k (ĉefe el blankteroraj landoj) materialo por ekspozicio kun temo: "Cenzuro". Sendu ĉion al *Wolf Koglin, Hamburg-Fu.,* Alsterkrugchaussee 562.

**Gekursanoj de Moskvaj Centraj Ŝtataj Kursoj de Esperanto**

dez. koresp. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. interŝ. PK ilustr., gaz., esp-aĵojn. Adr.: *Moskvo (USSR),* Sivcev Vraĵek 25, 21-aja Ŝkola Ĥono.

**POLIO**

**Lernolibrojn kaj vortarojn naci-esper. kaj esper.-naciajn en sen-escepte ĉiuj lingvoj deziras inter-ŝanĝi kontraŭ pollandaj esper-antaĵoj K-do Jan Zawada, re-daktinto de ĵus eldonita "Plena Fundamenta Vortaro esper.-pola"**

Adreso: WARSZAWA, M. O. Czerniaków, ul. Zaciszna 1, Pol. Sendu antaŭe prop.!

**METALLABORISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ!**

Zavolĵskaj metallaboristoj serĉas seriozajn korespondantojn pri la demandoj: labormovado, situacio de laboristoj, kondiĉoj de laboro, salajro, komjunularo k pionirmovado, ateismo, I. R. H., militdanĝero ktp. Resp. gar.: Skribu laŭ adr.: Sovetio. *Uljanovsk Zavolĵje,* Klubo je la nomo de 1-a de Majo (ĉelo de SEU.).

**K-doj en Anglio k Ameriko!**

Ĉe Leningrada klubo "Ruĝa Fervojisto" organiziĝis rondeto por studo de angla lingvo. Gek-doj el nomitaj landoj estas petataj helpi al la rondetanoj per angla koresp-ado, sendado de anglaj gaz. k libroj. Adr.: K-do N. Jaĥontov, *st. Slavjanka,* Okt. ĵ. d., Leningrad. obl. (USSR).

**Klubo de fervojistoj en Moskvo**

koresp. pri lab., junulara, sporta, ateista movadoj, foto, teatro k al. temoj, interŝ. PI. ilustr. gazetojn k ĵurnalojn, afiŝojn. Resp. estas garantiata. Adr.: *Moskvo,* Kalanĉevskaja ploŝĉad, Klubo KOR, kruĵok Esperanto, *Sov.*

**25 gelernantoj (naturamikoj)**

dez. koresp. kĉl. ĉefe pri lab. movado, politiko, sporto ktp. Je komenco de tia laboro ni intenc. aranĝi 7. jan. 1930

**Internacian leter- k poŝtkartvesperon.**

Ĉiu esp. rondeto aŭ grupo estas petata sendi salutkarton. Estontaj korespondantoj anoncu sin multnombre al K-do: *Otto Bruder,* Lerchenfeldstr. 10, Halle (Saale), Germ.

**20 gelernantoj**

15—18jaraj dez. koresp. k interŝ. L, PK, PI, PM, fotokartojn, il. gaz. kĉl. Resp. garantiata. Adr.: *A. Sikar,* Novoselskaja 86, ŝkola stroitelnogo uĉeniĉestva, *Odessa* (USSR).

**Korespondadon kĉl. deziras:**

*R. Schmiedel,* Chemnitz, Eisenweg 42, pri lernejoj, sporto,
*W. Köpping,* Chemnitz, Eisenweg 53, pri junularmov., sporto,
*W. Sieber,* Chemnitz, Eisenweg 49, pri sporto, radio,
*W. Lösch,* Chemnitz, Eisenweg 71, pri sporto, polit. ekon.,
*W. Horn,* Chemnitz, Eisenweg 49, kun fervojistoj,
*F. Heinrich,* Chemnitz, Eisenweg 47, pri ekonomio, trafiko,
*O. Oertel,* Chemnitz, Eisenweg 51, pri ĉiuj temoj,
*W. Gregori,* Harthau/Erzgeb. Rosa-Luxemburg-Str. 10, pri pol., ekon.,
*H. Müller,* Harthau/Erzgeb., Vanzetti-str. 1, pri junul., pol. ekonomio,
*H. Götz,* Chemnitz, Harthauer Str. 14, pri junul., sporto, fotado.

**Ĉiuj garantias respondon**

**K-do Roland Barta**

2816 High Street, *Denver,* Colorado, USA., dez. koresp. pri anarkismo, militservrezisto, pacifismo, Tolstojismo, kooperativismo, sunbanado, korpkulturo, kvakerismo, seksa temo, k. a. temoj, kĉl., L, PK, PI.

**SINICKIJ S. P.** (20 j. instruisto, junulo, korespondanto de ukrainiaj ĵurn.), dez. koresp. kun ekstereŭropaj Gek-doj per L, PK, PI, gaz. ĵurn. PM., fotoj. Resp. garant.!

Adreso: *g. Novo-Ukrainka* Zinovjevskogo okr. poŝtkesto 8. Sovetio.

**Juna K-do**

serĉas laboron en Francio. Kiuj Gek-doj povas helpi? Skribu por E. B. D. al Adm. de SAT

**Geamikoj k gekoresp-antoj de K-do Ĉerniajev Jurij (14948)!**

Skribu al mia nova adreso: USSR, Donbaso, *Konstantinovka,* Artemovski okr. al Jurij Ĉerniajev. — Mi ankaŭ serĉas novajn koresp-antojn, interŝ. L, PI, il. gaz. k ĵurn. pri muziko, dramo, pentrarto, ankaŭ esp-aĵojn.

**GEKAMARADOJ, ATENTU KAJ NEPRE HELPU!**

Grupo de esperantistoj-aktivuloj volas disvastigi la esp. movadon inter laboristoj de granda industria urbeto en Donbaso (USSR). Ĉi tie loĝas la laboristoj de jenaj sep-fabrikoj k laborejoj: ĥemia, vitraĵa, spegula, botela, ferlamena, zinkfanda, leda; sume 30 000 laboristoj.

Ni volas je fino de januaro 1930 aranĝi propagandan ekspozicion.

Gek-doj el ĉiuj landoj! Sendu al ni div. materialojn, sendu leterojn, PI, PK, nacilingvajn k esperantajn gazetojn k ĵurnalojn k div. aĵojn k esperantaĵojn.

Skribu pri viv- k laborkondiĉoj en viaj landoj, demandu nin.

Skribu, kion vi volus, por ricevi de ni. Ĉio estos rekompencota k respondota!

Ĉe ĉia fabriko ekzistas partiaj, profesiaj k komsomolaj ĉeloj k komitatoj, kiuj volas koresp. kun similaj eksterlandaj.

*Skribu amase k abunde!* Ni respondos nepre! Helpu la sukceson de nia ekspozicio k laboro!

SAT-anoj peradu!

NIA ADRESO: USSR, KONSTANTINOVKA, ARTEMOVSKIJ OKRUG, POŜTKESTO 37, ESPERANTO.

**ENHAVO:**


| | paĝo |
|---|---|
| Kial persistas la Kristnaska tradicio? | 133—134 |
| Kaduka ve-kanto | 134 |
| Italio, Musolini kaj aŭstriaj "hejmdefendantoj" | 134 |
| Fama lingvoscienculo mortis | 135 |
| Resumoj el la libro "Standards" (Normoj) | 135 |
| Popola voĉdonado en Latvio | 136 |
| Pri internaciismo — sennaciismo | 136 |
| Pensoj pri Klemanso | 136 |
| Esperanto-Servo | 137 |
| Sennaciula Sporta Paĝo | 138—139 |
| Diskutejo | 139 |
| Kiel oni traktas fremdajn maristojn en Nederlanda Gujano | 140 |
| Tra Esperantio | 141—143 |
| Korespondado, Anoncoj | 143—144 |


Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)